

Revuo **ESPERANTO** *Internacia*



N-RO 566 (1) JANUARO 1953



(foto : *Vjesnik*)

Vilaĝaninoj alportas siajn varojn al Zagreb (vidu paĝon 17)

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la
revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj,
anoncetoj sendu al
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,
Anglujo

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro : HANS JAKOB

Helpredaktoro : MASON STUTTARD

Jara abono (1953) : 15 ŝil. anglaj (kun
membreco kaj jarlibro 20 ŝil.)
Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Tarifo por reklamoj :
1 paĝo £6 ½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil. ⅙ paĝo 15 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-
kupono por ĉiu duo da vortoj

Legantoj en 80 landoj
Eldonnumero 6000

Traduko kaj represo de artikoloj estas
permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton.
Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.



Enhavo

Specialaj artikoloj :	paĝo
Novjara saluto : <i>La Prezidanto</i>	1
La mistera paketo : <i>D. Takaé</i>	21
Portland-cemento : <i>M. de Wadrd</i>	24
Legendo de la preĝejo surmonta : <i>J. M. Toorneman</i>	28
Poezio—Muziko : <i>Stepán Urban</i>	35
Glacirikolto : <i>R. Edis Fairbairn</i>	36
Fiska Simfonio : <i>W. A. Gething</i>	43
UNESKO-konferenco, Dec. 1952 :	
Rezolucio	2
Signifo de la Rezolucio : <i>D-ro I. Lapenna</i>	3
Parolado de D-ro Lapenna	7
Demonstracia Debatvespero en Parizo	10
Poezio : Vi ĉiuj, kiujn premas sort' : <i>A. Dvorák</i>	9
Noveleto : La fremda semo : <i>F. G. Rayer</i>	31
Teatraĵo Originala : (Belartaj Konkursoj 1952)	37
38a Universala Kongreso :	
Signifo de la U.K. en Zagreb : <i>Mason Stuttard</i>	12
Ŝtatestro esprimas simpatian	13
Urbestro promesas efektivan kunlaboron	15
Oficiala Komunikado n-ro 2	16
Zagreb—Impresoj : <i>Mason Stuttard</i>	17
Konstantaj Rubrikoj :	
Centro de Esploro kaj Dokumentado	11
Enigma Konkurso	44
Esperantista Vivo	9
Internacia Konkurso	48
Nia Forumo	20
Oficiala Informilo	47
Radio kaj Esperanto	46
Tra la libraro	30

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 566 (1)

Januaro 1953



Novjara Saluto de la Prezidanto

Bondezirante al ĉiuj legantoj de nia revuo okaze de la nova jaro, mi ŝatas diri kelkajn konkludajn vortojn pri la jaro 1952.

Kun ĝojo mi konstatas, ke la nuna organiza sistemo de U.E.A., aplikita jam dum 5 jaroj, evidente bone respondas al la bezonoj de nia movado, samtempe ebligante naturan evoluon de nia asocio. La “revolucia periodo” de U.E.A. forpasis ; 60 jarojn bezonis nia movado por atingi ekvilibron kaj internan harmonion. Sed nun U.E.A. estas kunfandita kaj povas dediĉi siajn fortojn unuece por konkeri la mondon. Al nia perfekte laboranta Centra Oficejo kaj al la el historia vidpunkto grava Serva Centro ni povis aldoni la Centron de Esploro kaj Dokumentado, kiu jam dum sia unua jaro faris treege valorajn servojn por la scienca esploro de la internacia lingvo kaj por la dokumentado de nia afero.

Al tio aldoniĝas la kreita sento de komuna respondeco pri starigitaj laborceloj en la menso de la Esperanto-gvidantoj tra la tuta mondo. Antaŭ monato la Ĝenerala kunsido de Unesko okazis en Parizo por i.a.

pritrakti la problemon de internacia lingvo kaŭze de nia Petskribo al UNO. Mi plenumas karan devon, kiam mi nun oficiale dankas al tiuj gvidantoj de multaj landaj asocioj, kaj al tiuj kunlaborantoj de C.E.D., kiuj faris ĉion eblan por kontakti siajn Unesko-komisionojn kaj informi ilin pri nia lingvo. Kun tiaj kunbatalantoj ni venkos ! Niaj oficialaj observantoj ĉe la Unesko-kunsido, S-ro Durrant kaj Prof. Lapenna, ankaŭ meritas grandan honoron pro la lerta gvidado, kaj mi publike volas esprimi al ili mian dankon.

La rezulto ĉe Unesko, pri kio informas alia artikolo en nia revuo, signifas novan belegan sukceson por Esperanto. Ĝi, krome, malfermas la pordon al pluraj venkoj en tiuj medioj. Ni nun sukcesis treege firmigi nian pozicion en la oficialaj rondoj ĉie en la mondo. Nia devizo por 1953 estu :

Disvastigi, plibonigi kaj firmigi la kontakton kun oficialaj rondoj kaj samtempe grandskale daŭre informi la ĝeneralan publikon pri la genia solvo de la interlingva problemo, kia estas Esperanto.

E. Malmgren.

Rezolucio de UNESKO pri Esperanto

La Ĝenerala Konferenco de UNESKO,

Konsiderante,

(a) ke Internacia Petskribo favore al Esperanto, subskribita de 492 organizaĵoj kun entute 15,454,780 membroj kaj de 895,432 individuaj personoj, estis prezentita al Unuiĝintaj Nacioj kaj transdonita fare de la Sekretariaro de tiu ĉi Organizaĵo al la Sekretariaro de UNESKO ;

(b) ke UNESKO havas bonan kaŭzon atenti la rezultojn atingitajn per Esperanto por la evoluigo de la intelektaj rilatoj kaj interkompreniĝo inter la popoloj,

INVITAS la Ĝeneralan Direktoron komuniki la Petskribon al la ŝtatoj-membroj kaj entrepreni, kiel parton de la normalaj aktivecoj de la Sekretariaro, la necesajn preparlaborojn por ebligi al la Ĝenerala Konferenco decidi, dum ĝia Oka Kunveno, pri la agoj farotaj je tiu ĉi Petskribo.

Noto : La supran Rezolucion ĵus akceptis Laborgrupo de la Programkomisiono ĉe la Sepa Kunveno de la Ĝenerala Konferenco—la supera organo de UNESKO—okazinta en Parizo de la 12-a de Novembro ĝis la 10-a de Decembro 1952—kun la jena amendo, **ke la prepara laboro estu bazita sur la respondoj kiujn UNESKO ricevos de la registaroj** (laŭ propono de la brita delegacio). La publikigita teksto estas traduko el la angla lingvo.

LASTMOMENTE

laŭ letero ricevita de UNESKO la Ĝenerala Konferenco akceptis je la 10a de decembro 1952 la supran rezolucion en jena mallongigita formo :

“La Ĝenerala Direktoro estas rajtigita komuniki al Membroj-Ŝtatoj la Internacian Petskribon favore al Esperanto, kiu estas prezentita al la Unuiĝintaj Nacioj kaj transsendita de tiu Organizaĵo al UNESKO, kaj entrepreni, konforme al komentoj ricevitaj, la necesan preparlaboron por ebligi al la Ĝenerala Konferenco decidi, dum ĝia Oka Kunveno, pri la agoj farotaj je tiu ĉi Petskribo.”

La Signifo de la UNESKO-Rezolucio

En novembro kaj decembro 1952 okazis la Sepa Kunveno de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Parizo. Ĉar la problemoj pri la internacia lingvo estis en la tagordo, UNESKO invitis al UEA sendi observantojn. Dum 3 semajnoj nia estrarano Prof. Ivo Lapenna restis en Parizo, kie li entreprenis sennombrajn rendevuojn kaj traktadojn kun la UNESKO-delegitoj. Li kaj S-ro Durrant, nia konstanta UNESKO-komisiito, kiu ankaŭ ĉeestis je la fintraktadoj en Parizo, meritas grandan laŭdon. La ĉi suba artikolo montras la rezultojn atingitajn kaj donas samtempe imagon pri la laboro farita.

E. Malmgren, Prezidanto de U.E.A.

Konsiderante la eksterordinaran gravecon de la venko, kiun nia Movado atingis ĉe UNESKO en la pasinta Decembro, mi opinias, ke estas necese prezenti almenaŭ en plej konciza formo kelkajn esencajn faktojn. Tiamaniere pli klare, pli reliefe montriĝos la grandega signifo de la UNESKO-Rezolucio, kiun ni publikigas aliloke en tiu ĉi numero de nia revuo.

I

Mi memorigas, ke la 2-an de Aŭgusto 1950 estis transdonita al Unuiĝintaj Nacioj en Lake Success (Usono) la konata Petskribo de U.E.A. favore al Esperanto. Post kelkaj tagoj la Sekretariaro de OUN transdonis la Petskribon al Sekretariaro de UNESKO en Parizo. Pro la formo, laŭ kiu la Petskribo estis sendita de unu Sekretariaro al la alia, ekestis duboj koncerne la demandon ĉu fakte UNESKO estas ŝargita pri la afero aŭ ne. Tiujn dubojn fine plene rompis nur la Rezolucio.

La Sekretariaro de UNESKO opiniis, ke ĝi nenion povas fari

memstare en la afero kaj tial ĝi starigis la demandon antaŭ la Plenumkomitato de UNESKO. Ankaŭ tiu ĉi lasta ne volis ion ajn entrepreni, sed decidis en sia kunsido de la 27-a de Marto 1952 transdoni la demandon al la supera organo de UNESKO, nome al la Ĝenerala Konferenco.

Estas, tamen, necese tre substreki, ke la Plenumkomitato ne faris el la Petskribo apartan punkton de la tagordo de la Ĝenerala Konferenco. Male, la Plenumkomitato starigis al la Ĝenerala Konferenco la demandon ĉu entute UNESKO okupiĝu pri "la problemoj, kiujn starigas la diverseco de lingvoj por la intelektaj kaj moralaj rilatoj inter la popoloj" kaj pri "la rimedoj por faciligi la solvon de tiuj problemoj". En la dokumento 7C/PRG/11 de la 22-a de Aŭgusto 1952, en kiu mallonge estis prezentita la afero, estis per kelkaj linioj menciita ankaŭ nia Petskribo.

Kiel oni vidas, la Petskribo eniris en tiun tre larĝan ĝeneralan lingvan problemon. Tiu fakto kaŭzis, ke nia Petskribo estis en la komenco ne-

rimarkita, ĉar iel kaŝita inter multaj linioj de unu UNESKO-dokumento, kiu, siavice, prezentas nur ereton en la amaso da dokumentoj, kiujn eldonis UNESKO okaze de la Pariza Konferenco.

Se mi aldonas, ke por la studo de tiu ĉi larĝa problemo ne estis antaŭviditaj en la projekto de la UNESKO-budĝeto la necesaj financaj rimedoj kaj ke, laŭ la asertoj mem en la menciita dokumento, la Sekretariaro de UNESKO “disponas nek pri kreditoj nek pri necesaj specialistoj por studi la fundon de la problemo”, vidiĝos klare, ke la Ĝenerala Konferenco povis nur negative respondi al la demando starigita de la Plenumkomitato. Tiu negativa respondo, evidente, signifus fakte samtempe ankaŭ senbruan entombigon kaj de la Petskribo kaj entute de nia afero ĉe UNESKO por multaj jaroj.

Tiu ĉi jam de komenco malbona pozicio ankoraŭ multe pligraviĝis pro la malaltigo de la budĝeto, kiun decidis la Ĝenerala Konferenco en la unuaj tagoj de sia Sepa Kunveno, kaj pro la aliaj bone konataj okazaĵoj.

II

La sukceso, kiun ni fine atingis, estas ŝuldata al multaj pozitivaj faktoroj de nia Movado mem.

Kiam la Komitato de UEA en Oslo estis informita fare de S-ro Durrant, la Komisiito de UEA pri UNESKO-aferoj, kaj fare de la subskribinto pri la tiama situacio, ĝi decidis, ke la landaj asocioj koncentrigu ĉiujn siajn fortojn kun la celo doni al la naciaj UNESKO-Komisionoj kaj al la naciaj UNESKO-Delegacioj en la diversaj landoj ĉiujn necesajn informojn pri Esperanto. Fakte, aŭ la landaj asocioj, aŭ la unuopaj kunlaborantoj

de CED sukcesis ĝis la 12-a de Novembro kontakti la oficialajn UNESKO-instancojn en jenaj landoj: Brazilo, Kubo, Danlando, Britujo, Hindujo (Prof. Privat kaj Durrant), Nederlando, Norvegujo, Svedujo, Svislando, Urugvajo kaj Jugoslavujo, do entute en 11 landoj.

La Prezidanto de UEA, S-ro Malmgren, S-ro Durrant kaj la subskribinto ne nur mem estis en senĉesa skriba kaj persona kontakto, sed ankaŭ dum la tuta periodo de preparlaboroj vigle skribe rilatis kun la kunlaborantoj en diversaj landoj.

Nia CED preparis apartan dokumenton (CED/3), en kiu estis prezentitaj en konciza maniero ĉiuj atingiĝoj de Esperanto en ĝia 65-jara ekzistado. La 12-paĝa dokumento kun aparta presita kovrilo estis eldonita en 650 ekzempleroj en la lingvoj angla, franca kaj hispana. Krome, en maŝintajpita formo, ankaŭ en la nederlanda. La dokumenton ricevis ĉiuj naciaj UNESKO-Komisionoj kaj ĉiuj delegitoj ĉe la Pariza Konferenco.

La Informa Fakto de UEA, en kunlaboro kun U.E.F., organizis en Parizo specialan debatvesperon en Esperanto por la delegitoj de la Konferenco. Tiu debatvespero, pri kiu oni povas legi apartan raporton en la rubriko de CED, lasis profundan impreson je ĉiuj ĉeestantoj.

Ni sukcesis atingi, ke UNESKO allasu al la Konferenco du oficialajn observantojn de UEA. La Estraro decidis, ke S-ro Durrant kaj la subskribinto veturu al Parizo por tiu celo. Fakte, mi estis tie seninterrompe de la 13-a de Novembro ĝis la 2-a de Decembro inkluzive, dum S-ro Durrant povis ĉeesti la Konferencon nur de la 29-a de Novembro ĝis la 3-a de Decembro inkluzive.

Ne estas eble prezenti ĉi tie—kvankam tio estus ege interesa el la vidpunkto de la historio de la Esperanto-Movado—la vere grandegan laboron, faritan en Parizo inter ĉiuj delegacioj de la UNESKO-Konferenco. Sufiĉos se mi diros, ke absolute ĉiuj delegitoj de pli ol 60 delegacioj estis dum tiuj tagoj plurfoje kaj laŭ diversaj vojoj informitaj pri nia afero. La blua dokumento de CED troviĝis en ĉies manoj. La invitiloj al debatvespero atingis ĉiun delegiton. Pli ol duono el ili estis persone kontaktitaj. La vorto Esperanto vere multe aŭdiĝis dum tiuj tagoj en la koridoroj, en la haloj kaj en la salonoj de la UNESKO-Domo en Parizo !

Tamen, ni ne limigis nin nur al informado de la delegacioj antaŭ la Konferenco, nek nur al laboro dum la Konferenco mem. Ni dediĉis sufiĉan atenton ankaŭ al la gazetaro kiel esprimo de la publika opinio. Paralele kun la laboro en la Konferenco mem, en diversaj landoj komencis aperadi artikoloj pri Esperanto kaj UNESKO surbaze de la artikolo “UNESKO diskutas la lingvan problemon en internaciaj rilatoj”, kiun la Informa Fakto de UEA estis sendinta al la landaj asocioj kaj al la ĉefaj kunlaborantoj de CED en diversaj landoj. Pri tiu bonega kampanjo oni legu apartan raporton en la rubriko de CED. Ĉi tie mi nur menciui, ke pluraj el tiaj artikoloj atingis la delegaciojn en Parizo kaj bonege efikis favore al nia afero.

Al ĉiuj ĉi elementoj aldoniĝis fine la parolado, kiun mi havis la honoron fari en la nomo de UEA la 27-an de Novembro. Ĝi koncize resumis ĉiujn ĝistiamajn klopodojn kaj prezentis la starpunkton de nia asocio en la aktuala situacio kaj en la nuna

stadio de evoluo.

Tuj post tiu parolado la subskribinto havis intervjuon en franca lingvo por Radio-Genève laŭ la peto de la reprezentanto de la svisa radio.

La 29-an de Novembro matene la svisa delegacio decidis proponi rezolucion, kiu, kiel oni povas konstati komparante ĝin kun la sugesto farita la 27-an de Novembro, malmulte diferencas de tiu, kiun mi prezentis en la kadro de la menciita parolado. La 1-an de Decembro la svisa propono estis disdonita al ĉiuj delegacioj kiel dokumento 7C/DR/98 de UNESKO. La 3-an de Decembro matene ĝi estis ĉiuvoĉe akceptita de la laborgrupo pri kulturaj aktivecoj, formita de la programkomisiono kaj konsistanta el 20 ŝtatoj.

III

La signifo de la Rezolucio estas multobla. Jen la ĉefaj konkludoj :

(1) Per tiu tuta afero ni faris tre seriozan informan laboron ne nur en UNESKO mem, sed ankaŭ en la larĝaj popoltavoloj. Ni montris nian energion kaj nian forton. Ni pruvis klare, ke ni estas vere grava faktoro en la internacia vivo. Nia Asocio kaj la Esperanto-Movado entute montriĝis tute certe kiel la plej potenca movado el ĉiuj neŝtataj organizaĵoj, kunlaborantaj kun UNESKO.

(2) La Rezolucio per si mem signifas :

(a) ke ni povos sen malfacilaĵoj havigi nun al UEA la juran pozicion de konsulta asocio ĉe UNESKO ;

(b) ke ĉiuj ŝtatoj-membroj estos objektive informitaj pri la Pet-skribo kaj pri kelkaj gravaj detaloj rilatantaj al ĝi ;

(c) ke pro tio niaj landaj asocioj povos multe pli facile kunlabori kun la naciaj UNESKO-Komisionoj ;

(d) ke en la sekvantaj du jaroj nia afero estos pritraktata en la Sekretariaro de UNESKO *kiel tute speciala demando*, en la kadro de ĝiaj *normalaj aktivecoj* ;

(e) ke la Sekretariaro de UNESKO raportos objekte pri Esperanto al la sekvanta kunveno de la Ĝenerala Konferenco, kiu okazos en 1954 en Montevideo ;

(f) ke, si iam UNESKO pritraktos la ĝeneralan problemon de lingvoj en la internaciaj rilatoj, ni devos esti vokitaj—antaŭ ĉio ni—al kunlaboro ;

(g) ke en nia informado ni povos jam nun larĝe utiligi la Rezolucion por montri la gravecon de nia afero ;

(h) ke tiu ĉi vere serioza venko donos novan energion kaj novan entuziasmon al ĉiuj Esperantistoj tra la mondo daŭrigi la laboron por la afero de la Internacia Lingvo ankoraŭ pli insiste ;

(i) ke ĉiu Esperantisto, kiu ankoraŭ troviĝas ekster UEA, espereble sentos kiel sian devon aliĝi al la Asocio kaj tiamaniere kontribui al ĝiaj pluaj venkoj.

Tiuj estas la ĉefaj konkludoj.

Por tiu bonega sukceso la Movado ŝuldas sian dankon al multege da laborantoj, sed antaŭ ĉio al S-ro Durrant, kiu dum jaroj tiel trafe kaj insiste agadis sur tiu kampo; al nia Prezidanto, kiu kun multege da komprenemo sekvis la evoluon kaj kuraĝigis la landajn asociojn kaj la diversajn kunlaborantojn ; al ĉiuj gvidantoj de la landaj asocioj kaj al ĉiuj kunlaborantoj de CED, kiuj kontaktis kaj informis la naciajn delegaciojn, sed antaŭ ĉio al Prof. Privat, kiu tiel mirinde bone agis en Svislando kaj ĉe la Hinda Vic-

prezidanto de la registaro, S-ro Radakriŝnan ; al la getradukantoj de CED (Fraŭlinoj Minault, Reed, Vermaas kaj S-ro Doc. Régulo-Pérez), kiuj tradukis en la naciajn lingvojn la dokumenton CED/3 vere perfekte kaj vere rapide ; al la oficistoj de nia Centro Oficejo, precipe al S-ro Goldsmith, pro la teknike tre altnivela multobligo de la dokumento CED/3 kaj de aliaj cirkuleroj ; al la presejo de Gesinjoroj Oliver, kiu tiel bele aranĝis la eksterajn de la dokumento; al la landaj asocioj kaj al la kunlaborantoj de CED, kiuj sukcesis aperigi multajn tradukojn de la artikolo pri UNESKO kaj Esperanto en la naciaj gazetoj kaj revuoj ; al UEF, aparte al S-ro Warnier, pro la grava helpo koncerne la aranĝon de la debatvespero; al Generalo Bastien, kiu, malgraŭ sia aĝo, persone prezidis la debatvesperon kaj tiele multege kontribuis al ĝia alta nivelo ; al multaj aliaj, kiuj helpis diversmaniere en tiu vere grandioza laboro. Ĝi kunigis niajn spiritojn al la sama celo kaj ĝi montris, ke per komunaj fortoj, surbaze de seriozaj planoj kaj antaŭpreparoj, estas atingeblaj konsiderindaj rezultoj.

Al mi personé la Konferenco ankoraŭfoje klare montris kiom grandega, potenca kaj nobla estas la afero, por kiu ni ĉiuj luktas. Ni portu kun fiero nian kvinpintan verdan stelon kaj ni tenu alte nian kapon, ĉar nia celo estas pli ol justa kaj niaj vojoj estas ĝustaj. Ni devas sendube ankoraŭ multe batali kontraŭ ĉiaspecajn antaŭjuĝojn, nescion, ignoradon. Sed ni povas esti konvinkitaj pli ol iam, ke tute certe venos la tempo, kiam la estontaj generacioj estos dankemaj al ni pro la laboro, kiun ni nun faras por ili.

Prof. Ivo Lapenna.

Parolado de Prof. I. Lapenna

EN LA ĜENERALA KONFERENCO DE UNESKO

Prof. I. Lapenna kaj S-ro E. D. Durrant partoprenis kiel reprezentantoj kaj observantoj de U.E.A., la Sepan Kunvenon de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO, ĵus okazinta en Parizo. La 27-an de Novembro posttagmeze Prof. Lapenna faris en la Konferenco paroladon, en kiu li precizigis la starpunkton de nia Asocio kaj kiu multe kontribuis al la fina sukceso. Jen la Esperanta traduko de la parolado, kiun li faris en la franca lingvo :

Sinjoro Prezidanto,
Sinjoroj Delegitoj,

Mi dezirus fari kelkajn rimarkojn pri la punkto 8.4.3.7. de la tagordo. En la dokumento 7C/PRG/11 de la 22-a de Aŭgusto 1952, kiu rilatas al tiu punkto de la tagordo, estas starigita la demando :

Ĉu la Ĝenerala Direktoro estas, jes aŭ ne, rajtigita fari studon pri la problemoj, kiujn starigas la diverseco de lingvoj por la intelektaj kaj moralaj rilatoj inter la popoloj.

En la sama dokumento estas menciita Internacia Petskribo favore al la lingvo Esperanto. Sekve, la Petskribo eniris en la ĝeneralan kadron, en la kadron multe pli larĝan de la lingva problemo en la internaciaj rilatoj.

Pro la fakto, ke la Petskribo estas prezentita fare de Universala Esperanto-Asocio, en kies nomo mi havas la honoron esti ĉi tie kiel reprezentanto kaj observanto, mi opinias necesa precizigi ĝian vidpunkton, des pli, ĉar nia Asocio reprezentas en tiu ĉi aparta afero 492 organizaĵojn kun entute 15,454.780 membroj kaj 895.432 individuajn personojn :


(1) Nek nia Organizaĵo nek la subskribintoj de la Petskribo iam ajn petis, ke UNESKO entreprenu studon de la lingva problemo en la internaciaj rilatoj. Estas la Plenumkomitato de

UNESKO, kiu faris tiun proponon. Kompreneble, ni opinias, ke tia esploro estus tre grava kaj ke UNESKO devos studi iun tagon tiun ĉi problemon en ĝia tuteco. Se iam UNESKO decidiĝos alpaŝi la demandon, ni postulos, ke en la organismo, vokita studi ĝin, troviĝu personoj kvalifikitaj, kiuj ne nur scias bone Esperanton, sed ankaŭ profunde konas ĝian evoluon, ĝian literaturon, ĝiajn aplikojn en la internacia praktiko. Laŭ nia opinio, nur personoj havantaj tiajn kvalitojn povas doni seriozan kaj sciencajn juĝon pri la lingvo.

Ŝajnas al ni, ke en la aktuala situacio UNESKO ne havas la necesajn financajn rimedojn por studi en iu proksima estonteco la fundon de la demando.

(2) Se tiel prezentigas la afero por tiu ĉi problemo pli larĝa, tamen restas la Internacia Petskribo favore al Esperanto. Koncerne ĝin mi volus substreki du tre gravajn punktojn :

(a) La preciza enhavo de la Petskribo estis neniam komunikita al la ŝtatoj-membroj. Ni opinias, ke—antaŭ ol UNESKO donas kian ajn respondon—la ŝtatoj-membroj devas koni ĝian enhavon, kiel ankaŭ kelkajn gravajn detalojn, ekzemple, ke la Petskribo estis subskribita de unu Prezidanto de Respubliko, pluraj ministroj, 400 parlamentanoj, 1,500



D-ro I. Lapenna reprezentas UEA kaj defendas la aferon de la Internacia Lingvo ĉe UNESKO. S-ro E. D. Durrant, la alia reprezentanto de UEA alvenis iom poste.

lingvistoj, 2.000 aliaj scienculoj kaj universitataj profesoroj, 40.000 instruistoj k.t.p., k.t.p.

(b) Ni plue opinias, ke UNESKO devus—en la intereso de sia prestiĝo—doni respondon al la Petskribo. Tiu ĉi respondo povas esti — kiel ni esperas—pozitiva, sed ĝi povas esti ankaŭ negativa. En ambaŭ kazoj UNESKO devus, laŭ nia opinio, motivigi sian decidon. Nu, por fari tion, estas necese, ke UNESKO entreprenu studon, almenaŭ tre limigitan, pri la grandaj rezultoj jam realigitaj per la lingvo Esperanto en ĉiuj sferoj de la internacia vivo kaj precipe en tiuj de intelektaj interŝanĝoj, disvastigo de la kulturo kaj evoluigo de la internacia amikeco.

Tiu ĉi limigita studo povus esti farita sen malfacilaĵoj kaj sen ŝarĝi la budĝeton, en la kadro de la regulaj aktivecoj de UNESKO.

Nur post la komuniko de la Petskribo al la ŝtatoj-membroj kaj post la studo de la demando en la Sekretariaro, la sekvanta kunveno de la Ĝenerala Konferenco povus havi la necesajn elementojn por decidi kiun sekvon oni devas doni al la Petskribo. Mi, do, prenas la liberecon sugesti jenan rezolucion :

“La Ĝenerala Konferenco
de UNESKO,
Konsiderante,

(a) ke Internacia Petskribo favore al Esperanto, subskribita de 492

organizaĵoj kun entute 15,454.780 membroj kaj de 895.432 individuaj personoj, estis prezentita al la Unuiĝintaj Nacioj kaj transdonita fare de la Sekretariaro de tiu ĉi Organizaĵo al la Sekretariaro de UNESKO;

(b) ke UNESKO havas ĉian kaŭzon por doni sian atenton al la rezultoj realigitaj per la lingvo Esperanto por la progresigo de la intelektaj kaj moralaj rilatoj inter la popoloj, *invitas* la Ĝeneralan Direktoron komuniki la Petskribon al la ŝtatoj-membroj kaj entrepreni, en la kadro de la regulaj aktivecoj de la Sekretariaro, la necesajn prepar-laborojn, por ke la sekvanta kunveno de la Ĝenerala Konferenco povu decidi pri la sekvo, kiun oni devus doni al tiu ĉi Petskribo."

Se la Konferenco povus akcepti tian rezolucion, mi opinias, ke la sugestita solvo estus kontentiga kaj el vidpunkto de UNESKO, kaj el tiu de la subskribintoj de la Petskribo, kiel ankaŭ el vidpunkto de nia Organizaĵo.

Ni devas ne forgesi, ke jen la unuan fojon en la historio de UNESKO—laŭ nia scio—milionoj da personoj, inter kiuj multaj apartenantaj al la intelektaj elitoj de ĉiuj popoloj, petas, ke UNESKO donu sian atenton al problemo tre aktuala de la internacia vivo. Estus vere ne nur maljuste por la subskribintoj, sed ankaŭ tre senkuraĝiga ekzemplo por la estonteco, se UNESKO rifuzus la Petskribon *aprior*e, sen ia ajn antaŭa studo, sen eĉ konigi ĝian enhavon al la ŝtatoj-membroj.

Sinjoro Prezidanto, Sinjoroj Delegitoj, mi dankas al vi tutkore.

Antonín Dvořák :

Vi ĉiuj, kiujn premas sort'

(El Vesperaj Kantoj de Vítězslav Hálek)

*Vi ĉiuj, kiujn premas sort',
al mi proksimen venu,
la zorgo-ŝarĝon metu for
kaj la forges' vin benu.*

*Jen amoregnon fondis mi,
en kiu fratas homoj,
kaj kion kaŝas kor' en si,
ĝin mole diras tonoj.*

*Ĉi tie mutas la envi',
dolĉkantas amsoneto,
sin ŝanĝas lup' je ŝafa id',
vultur' je kolombeto.*

*Ĉi tie resaniĝas kor'
kaj ĉiu daŭre junas,
jen ne forvelkas roza flor',
malam' nenium punas.*

Trad. Jiří Kořínek.

Esperantista Vivo

Naskiĝoj

Hölscher. Al Ges. Hans Hölscher (Frankfurt/Main-Griesheim, Am Niedwald 45, Germanujo) filino Marion, je 14 novembro 1952.


Roose. Al Ges. Fernand Roose, Brugge, Belgujo, filino Hilde, je 7 decembro 1952.

Geedziĝoj

Jorgensen-Simonsen. S-ro Chr. Jorgensen kun F-ino Irma Simonsen, en Kolding, Danujo, 30 aŭgusto 1952.

Tvarožek-Kuchtová. S-ro E. V. Tvarožek kun Viera Kuchtová, en Martin, Ĉeĥoslovakujo, 6 decembro 1952.

Al ĉiuj ni esprimas nian sinceran gratulon.



Centro de Esploro kaj Dokumentado

300, West End Lane, London, N.W.6, Anglujo

Demonstracia Debatvespero en Parizo

(Okaze de la UNESKO-Konferenco)

Okaze de la Sepa Kunveno de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Parizo, la Centro de Esploro kaj Dokumentado, en kunlaboro kun UEF, organizis specialan debatvesperon. La celo estis montri al la delegitoj de la UNESKO-Konferenco la funkciadon de la Internacia Lingvo kiel lingvo de diskutoj.

La debatvespero okazis mardon, la 18-an de Novembro, je la 18.30 en la belega salono de "Union des Fabricants", proksime de la UNESKO-Domo. Prezidis Generalo Bastien, kiu en la franca lingvo mallonge prezentis la celon de la vespero.

La temo de la diskuto estis "La problemo de la lingvo en la intelektaj internaciaj rilatoj". La debaton enkondukis per 10-minuta paroladeto Prof. I. Lapenna. La diskuton partoprenis Prof. L. Laurat (laŭdevene Ĉeĥo), Pastro Machado (Brazilano), Prof. G. Waringhien (Franco), S-ro Sellin, studento (Norvego) kaj Prof. I. Lapenna (Jugoslavo).

Proksimume 70 ĉeestantoj—delegitoj, vicdelegitoj aŭ sekretarioj de diversaj delegacioj ĉe la UNESKO-Konferenco kaj pluraj gravaj oficistoj de UNESKO—kun intereso sekvis la evoluon de la diskuto kaj ĝenerale komprenis ĝian enhavon, kvankam ili ne sciis Esperanton. La tuta debato en Esperanto daŭris proksimume tri kvaronojn de horo.

Ĝi estis sur tre alta enhava nivelo kaj la lingvo torente fluis el la buŝoj de la diskutantoj.

Post la debato en Esperanto, ĉiuj ĉeestantoj povis starigi demandojn en unu el la lingvoj, kiujn parolas la kvin diskutantoj, nome en la lingvoj: franca, angla, germana, itala, norvega, dana, sveda, portugala, rusa, serba-kroata, ĉeĥa kaj hispana. Fakte, multaj demandoj estis starigitaj kaj la respondoj estis donitaj en la lingvo, en kiu la demando estis farita. Ankaŭ tio lasis profundan impreson. Ni ne forgesis atentigi, ke, jen, la kvin diskutantoj kune parolas dekdu naciajn lingvojn, sed ke neniu el tiuj lingvoj estas komuna por ili. Nur la Internacia Lingvo estas ilia komuna lingvo !!

La tuta aranĝo finiĝis per koktelo kaj ĉampanvino, prezentitaj de UEF al ĉiuj ĉeestantoj en aparta salono.

Estas menciinde, ke pro la limigita spaco de la salono oni ne povis inviti ĉiujn delegitojn senescepte, sed nur la reprezentantojn de ĉiuj delegacioj. La invitiloj estis presitaj kaj kiel invitantoj al la aranĝo funkciis Unuiĝo Esperantista Franca, S-ro Maurice Duperrey, eksprezidanto de Internacia Rotario, Prof. Maurice Fréchet, prezidanto de ISAE kaj Generalo L. Bastien, Honora Prezidanto de UEA. En la organizo de tiu ĉi vespero multe helpis S-ro Warnier, la Honora Prezidanto de UEF.

La debatvespero sukcesis el ĉiuj vidpunktoj vere bonege. Ĝi estis digna kaj altnivela aranĝo, kiu multe altigis la reputacion de nia Movado. Pri la aranĝo aperis raporto en "Le Figaro", unu el la plej grandaj francaj gazetoj, en la numero de la 19-a de Novembro.

Bonega rezulto de gazeta kampanjo

La 27-an de Oktobro estis sendita per aparta cirkulero al ĉiuj landaj asocioj kaj al la ĉefaj kunlaborantoj de CED Esperantlingva artikolo kun la titolo "UNESKO diskutas pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj", verkita de la honorofica direktoro de CED. Temas pri la artikolo, kiu aperis ankaŭ en la numero 16 de la 16-a de Novembro en la gazeto "Heroldo de Esperanto".

Laŭ la ĝis nun ricevitaj informoj, tiu ĉi artikolo aperis ĉu komplete ĉu en iom mallongigita formo en la sekvantaj lingvoj: *itala* en la granda gazeto "Il Giornale della Sera" en Romo la 15-an de Novembro 1952 kun titolo super ses kolonoj; *germana* en du svisaj gazetoj; *hispana* en unu gazeto kun titolo super kvar kolonoj; *sveda* en tri gazetoj, el kiuj en unu komplete kaj en du en iom mallongigita formo; *portugala* en unu gazeto kun titolo super du larĝaj kolonoj; *franca* en unu gazeto kun titolo super kvar kolonoj; *serba-kroata* en du gazetoj kaj unu revuo kun titoloj super du, tri kaj kvar kolonoj; *angla* en unu gazeto; *nederlanda* en kvar gazetoj. Entute do la artikolo aperis en 17 gazetoj kaj revuoj en 9 naciaj lingvoj.

En la sekvanta numero ni donos kompletan raporton pri tiu ĉi bonega sukceso kaj pri la kunlaborantoj, kiuj kontribuis al ĝi.

Kiuj landoj finance helpas al CED?

En la pasinta laborjaro, nome inter la 1-a de Septembro 1951 kaj la 31-a de Julio 1952, CED ricevis entute £220 2ŝ. 2p. kiel donacojn de diversaj esperantistoj kaj Esperanto-organizaĵoj. Ne estas neinterese publikigi tiun ĉi mallongan resumon pri la landoj el kiuj venis la donacoj: Britujo £103 17ŝ. 6p., Francujo £15 10ŝ. 0p., Maroko £20, Novzelando £5, Hispanujo £1, Kanado 10ŝ., Nederlando £26 6ŝ. 0p., Danlando £3. Svedujo £39 8ŝ. 8p., Belgujo £5, kaj Aŭstralio 10ŝ. Kiel oni vidas, preskaŭ duonon de la donacoj faris niaj britaj geamikoj.

La donacoj ebligis al CED evoluigi la laboron, pri kiu hodiaŭ ĉiu esperantisto fieras kaj pri kiu nia publiko estas regule informata pere de la Esperanto-gazetaro.

En la nuna jaro la donacoj estas ĝis nun multe pli modestaj ol en la pasinta jaro, kvankam la esperantistaro havas nun la okazon pli klare vidi la signifon de CED kaj taksii ĝian rolon.

Ni atentigas, ke *sen almenaŭ minimumaj financaj rimedoj CED ne povas funkcii*. Tial ni apelacias al la esperantista konscio kaj esperas, ke baldaŭ alvenos konsiderindaj donacoj el ĉiuj landoj, sed precipe el tiuj, kiuj ĝis nun absolute nenion kontribuis por CED, kiu ja estas propraĵo de la tuta Movado kaj laboras en la intereso de nia komuna afero.

Donacoj al CED

por la laborjaro 1952-53

	£	ŝ.	p.
Stato la 4-an de Novembro 1952	44	10	0
D-ro O. Reiersøl, Oslo	..	3	10 11
R. Geerinck, Belgujo	..	7	0
G. R. Gousseau, Francujo	..	1	0 0
Entute la 8-an de Decembro 1952	£49	7	11

Mason Stuttard :

Signifo de la Universala Kongreso en Zagreb

En la nuna numero de nia revuo ni konigas al la mondo ĝenerale, kaj al la Esperantista publiko specife, informojn pri du gravaj okazaĵoj rilate al la 38a Universala Kongreso en Zagreb. Temas pri la aŭdiencoj kun la Prezidanto de la Kroatia Registaro kaj kun la urbestro de Zagreb.

La Esperantistoj jam plurfoje havis okazon ĝoji pri rekono de oficialaj instancoj. Granda diferenco en Zagreb estas tio, ke la oficialaj instancoj tie ne faras tion kiel nuran geston, sed efektive havas viglan intereson pri la kongreso kaj deklaris sian aktivan partoprenon en la preparaj laboroj. La ŝtato jam faris belan geston per financa subvencio kaj nun la urbestro de Zagreb intencas delegi reprezentantojn al la organiza komitato por ke nenio malhelpu la sukcesan evoluigon de la organizado.

Verŝajne neniam antaŭe en la historio de niaj Universalaj Kongresoj ŝtato kaj urbo tiel pozitive deklaris sian favoron al la kongreso. La situacio nun estas do ke la sukceso laŭ organiza kaj administra starpunktoj estas garantiita !

La motivo kaj la kaŭzo de tiu ĉi aktiva subteno estas troveblaj en la rolo de la kongreso por la jugoslavaj popoloj. Por ili la kongreso estas io unika. Kvankam ĉiujare venas al Jugoslavujo miloj da turistoj, neniam antaŭe venis samtempe tia reprezenta amaso da homoj el tiom da popoloj de la mondo. Des pli imponas ke temas ne pri nuraj oficialaj reprezentantoj kiuj eble venas pro ia devo, sed

pri ordinaraj homoj el ĉiuj sociaj tavoloj, kiuj poste reportos proprajn kaj individuajn impresojn pri Jugoslavujo kaj pri la aŭdaca reformado socia kaj industria kiun nun entreprenas la popoloj. Per propraj okuloj tiuj centoj da homoj povos mem vidi la konkretajn rezultojn de la greftado de moderna civilizo sur la antikvan kaj kolororiĉan kulturon de la jarcentoj. La Universala Kongreso do estas por la jugoslavoj io pli ol nura kongreso de Esperantistoj ; ĝi estas okazo kiun uzi por montri al la mondo la atingojn de la juna ŝtato en ĝia lukto kontraŭ malklero, analfabetismo, ekonomia malstabilo kaj la malbonaĵoj de antaŭaj reĝimoj.

La Universala Kongreso ordinare estas speco de kulmino de la ĉiujara agado, rimedo per kiu ni demonstracias al la mondo nian ekziston. Ĉiujare okazas tiu manifestacio kaj ni ĉiujfoje esperas ke tiu koncerna kongreso sukcesos vekti la aktivan intereson de iu ŝtata instanco, tiel ke komenciĝos la granda agnosko oficiala pri la meritoj de Esperanto, kio kondukos al grand-skala enkondukado de la lingvo. Necesas nur ke unu ŝtato iniciatu klopodojn por la enkonduko de Esperanto kaj tre certe aliaj, ankoraŭ hezitemaj, sekvos la ekzemplon donitan ĝis fine ekzistos granda pezo de opinio favore al komuna lingvo neŭtrala. Iu ajn Universala Kongreso povus esti la decida. Do kiom favora estas la nuna momento kiam la kongreso jam varbis la aktivan atenton kaj apogon de ŝtata instanco !

Tamen la atento kaj apogo de oficialaj instancoj ne sufiĉas. Tiu ĉi situacio kreas devon por la Esperantistoj. Necesas ke la intereso de la nomitaj instancoj ne trompiĝu. Restas al la Esperantistoj mem subteni la laboron kaj agadon de la lokaj organizantoj tiel ke ili ne aspektu kiel pledantoj por vana kaj malserioza afero. Estas nepre necese, ke kolektiĝu en Zagreb por la 38a U.K. granda nombro da eksterlandaj gesamideanoj. Eĉ per nombroj sole tiu kongreso povos imponi. Ligitaj kun la laboroj de la kongreso—la Internacia Somera Universitato, la fakaj kunsidoj, la kunsidoj de la Estraro kaj Komitato de U.E.A., la prelegoj pri kulturaj temoj—kaj eĉ kun la nelaboraj aranĝoj de la kongreso—la esperataj vespero de muziko,

vespero de popoldanco, vespero distra kaj la balo—tia grandega amasa manifestacio povus signi por nia afero turniĝpunkton en la historio. Ĝi povus esti tiu decida momento pri kiu ĉiu vera samideano revas.

La Zagrebaj Esperantistoj kaj la gesamideanoj en tuta Jugoslavujo rigardas nun kun espero kaj fido al la ekstera mondo. Multo estas farita kaj multo certe estas farota, sed sen la aktiva, pozitiva helpo de la eksterlando la klopodado restos sen fruktoj. Venu al Zagreb! Venu grandamase el ĉiuj anguloj de la mondo! Montru la solidarecon de la Esperantista familio kaj per via ĉeesto batu ankoraŭ unu najlon en la ĉerkon de indiferento, kontraŭstaro kaj inerto pri nia afero!



Statestro esprimas simpatian al Esperanto

Prezidanto de la Kroatia Registaro akceptas esti Honora Protektanto de la 38a U.K. en Zagreb.

La 20an de novembro la Prezidanto de la Kroatia Registaro, D-ro Vladimir Bakarić, akceptis en aŭdienco la Konstantan Kongresan Sekretarion, S-ron Mason Stuttard kaj D-ron Ivo Borovečki, prezidanton de la L.K.K. D-ro Borovečki interpretis.

Post formalaj prezentoj S-ro Stuttard, nome de Universala Esperanto-Asocio, esprimis dankon al la Prezidanto pro la intereso, kiun li jam montris pri la Universala Kongreso okazonta en Zagreb, kaj pro la morala kaj praktika helpo kiun li jam donis al la preparaj laboroj. La sekretario skizis la gravan rolon de la Universala Kongreso en Jugoslavujo laŭ starpunkto de la

ekstera mondo, emfazante la grandan intereson en la eksterlando pri la socia kaj kultura vivo de la jugoslavaj popoloj. La universala kongreso malfermos pordon ne nur al la kelkaj centoj da kongresanoj kiuj venos al Zagreb, sed al milionoj da homoj sur la tuta terglobo pere de raportoj kaj prelegoj kiujn ili faros post sia reveno en sian hejmlandon.

D-ro Bakarić responde diris, ke li varme simpatias kun la ideo de Esperanto kaj memoras, ke en la gimnaziaj jaroj li trastudis la gramatikon de Esperanto sed poste pro premo de aliaj studoj ne okupiĝis pri ĝi. Li diris, ke li ĉiam sciis ke la Esperantistoj estas homoj progres-

emaj kaj li aparte gardas varman memoron pri la Esperantistoj kiuj aktivis en la revolucio kaj liberiga batalo.

En la ĝenerala konversacio kiu sekvis D-ro Bakarić rakontis pri siaj spertoj en internaciaj kongresoj kaj precipe ĉe U.N. kie li konstatis la urĝan bezonon de komuna lingvo. Gravega komento pri la situacio en U.N. estis lia deklaro ke post la komenca stadio li ne plu prenis la aŭdilojn pro la neeblo kompreni! D-ro Bakarić substrekis ke vanas paroli pri egaleco de popoloj en tiaj cirkonstancoj, kaj bonhumore rakontis, ke kiam li volis paroli pri io

grava kun anglo li ĉiam uzis la francan lingvon por ke ambaŭ havu la taskon uzi fremdan lingvon!

S-ro Stuttard parolis pri la precedentoj en aliaj kongresoj rilate al Honoraj Protektantoj kaj aparte citis la ekzemplon de la Kronprinco Olav de Norvegujo. Je peto ke la Prezidanto donu similan favoron al la 38a Universala Kongreso en Zagreb, D-ro Bakarić tuj konsentis.

La aŭdienco daŭris proksimume unu horon kaj la Prezidanto montris viglan kaj informitan intereson ne nur pri la planoj kaj programeroj de la kongreso, sed ankaŭ pri la ĝenerala problemo de lingvo internacia.



De maldekstre : Mason Stuttard, D-ro Vladimir Bakarić, D-ro Ivo Borovečki, ĉe la aŭdienco 20 Nov. 1952.



Urbestro de Zagreb promesas efektivan kunlaboron

La 21-an de novembro Doktoro Ivo Borovečki, prezidanto de L.K.K., Sinjoro Z. Rehorić, vicprezidanto de L.K.K., Sinjoro Marko Demetrović, sekretario de L.K.K., kaj Sinjoro Mason Stuttard, K.K.S., estis ricevitaj de la Urbestro de Zagreb.

S-ro Stuttard esprimis al la Urbestro la dankon de Universala Esperanto-Asocio pro la konkreta helpo jam donita al la organizado de la Universala Kongreso kaj esprimis la esperon ke la kunlaboro inter la urbaj instancoj kaj la organiza komitato portos fruktojn por la komuna bonfarto de ambaŭ instancoj. S-ro Stuttard parolis pri la unika okazo, kiun prezentas la kongreso, por ke homoj el multaj landoj povu veni kaj mem vidi la riĉan kulturen vivon de la jugoslavaj popoloj kaj iom kompreni la grandan taskon je konstruo, kiu nun okazas en ĉi tiu lando.

La urbestro, interpretite de D-ro Borovečki, siavice esprimis la dankon de la Urbestro pro tio, ke la Estraro de U.E.A. akceptis la inviton de Zagreb por 1953. Li aparte emfazis sian ĝojon ke per ĉi tiu kongreso oni povos fari kontribuon al tutmonda

paco kaj interproksimigo de la popoloj, kiu estas unu el la plej gravaj taskoj de la jugoslavaj popoloj. La urbestro daŭrigis per certigo, ke la urbestro de Zagreb volas, ke la kongreso estu granda sukceso kaj domaĝos nenion por atingi tiun celon.

Post longa diskuto pri programaj aranĝoj kaj teknikaj detaloj en kiu manifestiĝis la tutkora simpatio de la urbestro, tiu faris proponon verŝajne sen precedento en la historio de kongresa organizado. Li proponis —kaj la reprezentantoj de la L.K.K. akceptis—ke por efektivigi la plej intiman kunlaboron kaj por solvi surloke plej efike la diversajn teknikajn demandojn kiuj leviĝos tra la jaro, li delegos du reprezentantojn de la urbestro ke ili sidu en la organiza komitato. Tiamaniere la problemoj de la komitato estos tuj transprenataj de la komunumo por solvo.

La urbestro kondukis la delegitojn tra la urba domo—interesa restaĵo el la baroka periodo — kaj montris diversajn objektojn. Antaŭ ol adiaŭi, li donacis al la Konstanta Sekretario belan albumon de reproduktaĵoj de oleopentraĵoj kun titolo *Malnova Zagreb*, kiel memoraĵon de ties vizito.

^
**Via aliĝo multe helpas al la
sukceso de la kongreso !**



38-a Universala Kongreso de Esperanto

25 julion—1 aŭguston, 1953

Poŝtfako 213, Zagreb, Jugoslavujo

N-ro 2

OFICIALA KOMUNIKO

Decembro 1952

Subvencio : La Registaro de la Kroatia Respubliko asignis al la 38-a Universala Kongreso de Esperanto la sumon 500.000 dinarojn.

Perantoj : (aldonu al la antaŭa listo).

Belgujo : Reĝa Belga Ligo Esperantista, 106, rue Général Lotz, Bruxelles—Uccle.

Finnlando : S-ro Joel Vilkki, Somero.

Germanujo : Germana Esperanto-Asocio, 7 Engelbertstr., München-Pasing.

Italujo : Itala Esperanto-Federacio, Via Saluzzo 44, Torino.

Svedujo (korekto) : Sveda Esperanto-Federacio, Tegelbacken, Stockholm.

Junularo : En Podlabin, Jugoslavujo, Esperanto estas devige instruata al 114 infanoj 10-14-jaraj, inter kiuj estas 30-membra orkestro de "tamburice" (nacia instrumento). Loka karbmina entrepreno subtenas tiujn gejunulojn kaj promesis ebligi al ĉiuj la aliĝon kaj partoprenon al la kongreso. LKK tial urĝe petas, ke granda nombro de gejunuloj venu al Zagreb. LKK preparos specialan programon por la junularo.

Kotizoj : Bonvolu atenti, ke post 31 Decembro la pli alta kategorio de kotizoj validas. LKK denove sciigas, ke la lasta dato por kongresaliĝoj estas la 30-a de junio 1953. Aliĝoj venintaj post tiu dato estos malakceptataj.

Statistiko : (ĝis 30 novembro) : Argentino 1, Aŭstrujo 3, Belgujo 2, Brazilo 1, Britujo 27, Danlando 8, Finnlando 3, Francujo 12, Germanujo 10, Gvatemalo 1, Hispanujo 1, Italujo 9, Jugoslavujo 48, Nederlando 5, Norvegujo 7, Portugalujo 1, Svedujo 23, Svislando 7, Usono 1; sume 170 el 19 landoj (lastjare samdate 179).

Mason Stuttard,

Konstanta Kongresa Sekretario.

Mason Stuttard :

Zagreb — Impresoj

La vizitanto je alveno en Zagreb rimarkas frapantan kontraston kun la konata medio. Se li alvenas aviadile lin surprizas mallonge antaŭ la alteriĝo la proponata glaseto da “rakija” (indiĝena brando) kiun alportas la ĉarma stevardino de Jugoslava Aero-Transporto. Eble nur poste li memoras tiun incidenton kiel specon de aŭguro—ĉu bona aŭ malbona dependas de la individua starpunkto—ĉar unu el la elstaraj impresoj pri Zagreb estas la granda nombro da vendejoj por brandoj, vinoj kaj likvoroj ! En ordinara spicista butikoj pli ol duonon de la breta spaco okupas boteloj de alkoholaĵoj.

Sur la stratoj de Zagreb kuniĝas la urbo kaj la kamparo. Tie kunpuŝiĝas la konvene vestitaj homoj de la urbo kaj la kamparanoj kun la humo sur la jako. Longapaŝe piediras pufestitaj kamparaninoj (devas esti deko da subjuoj !) kun peza korbo sur la kapo. Kiom valoraj devas esti tiuj manbroditaj juoj kaj ŝaloj kiuj incite svingiĝas kun ĉiu paŝo ! Oni ne miru se la tramo en kiu oni veturas subite haltas por lasi preterpasi aron da brutoj irantaj al la vendejo. Jam de la kvara matene ekbruas la procesio de ĉaroj kaj veturiloj ŝargitaj per la produktaĵoj de la kampoj. Sur la trotuaroj piediras la virinoj kun siaj korboj. Al la vendoplaco ! Al la merkato ! Kaj same frue tien sin direktas ankaŭ la prudenta dommastrino por fari bonaĉeton de freŝaj ovo, kremo, butero (volvita en brasikfolio !), fromaĝoj, fruktoj kaj legomoj. Aŭ eble baldaŭ estos festotago kaj oni sentas sin en franda

humoro. Jen do fortikaj kamparaj knabinoj kun kelke da birdoj—meleagro, ansero grakanta sian defion al la fremda amaso, kokido, kaj iafoje timblekanta porkido bedaŭranta la fortiriĝon for de la patrino. Verŝajne en neniu alia okcident-Eŭropa ĉefurbo oni povas renkonti dommastrinon hejmenirantan kun vivanta meleagro aŭ kriaĉanta porkido sub la brako. Mi eĉ vidis viron kun porkido en sia teko ! Bela prilaboraĵo por la oficejo ! Neniu Zagrebano pripensus aĉeti birdon jam mortigitan ! Decas scii, ĉu ĝi estas freŝa !

La ĉefa arterio de Zagreb estas strato Ilica (la prononco de vortoj feliĉe estas kiel en Esperanto sed kun akcento sur la unua silabo) kiu tranĉas la urbon en du partojn. De la ĉefplaco Respubliko okcidenten ĝi estas la ŝatata butikumejo de la grandaj amasoj, kiuj tie formikas je ĉiuj malfermaj horoj. Sude de Ilica la tereno ebenas ĝis la rivero de Zagreb—Sava—kaj plu ĝis la malproksima horizonto. En tiu distrikto la multaj kulturaj kaj intelektaj instancoj havas siajn hejmojn, muzeojn, ekspoziciejojn, akademiejojn, bibliotekojn k.s. ĝis la fervojlinio, la vojo de la fama Orienta Ekspreso kuranta inter Parizo kaj Istanbul. Magiaj nomoj . . .

Aliflanke de Ilica per abrupta deklivo oni iras en la malnovan urbon, la “supran urbon” kaj tuj oni retroiras en la tempon, en la mezepokon. Tie estas pli kviete, kiel konvenas en lokoj de memoraĵoj. Tie la homo povas mediti pri la sorto kiu tiel kaprice traktis la urbon Zagreb

tra la jarcentoj, kaj tie oni povas vidi la postsignojn de multjarcentaj kulturo kaj tradicio. La Esperantisto literaturamanto staras kun emocio antaŭ la malgranda domo apud la Ŝtona Pordego, memorante la kruelan sorton de la filino, la trezoro de la oraĵisto, tiel vigle prezentitan en la tiunoma tradukaĵo nialingva . . .

Ekzistas en Jugoslavujo nenia porciumado per kuponoj sed la prezoj efike bremsas ian ajn tendencon al malŝparemo. La prezoj estas fakte altegaj por la enlandanoj kaj por eksterlandano ne estas malaltaj. Supo kun unu plado kostas 150–200 dinarojn. Kafo je 3000 din. por kilogramo estas ekster la atingo de la



(foto : Vjesnik)

La Ŝtona Pordego
sole restanta tur-pordego de la fortikaĵo Zagreb el 13a jarcento.

granda plimulto, kiu devas kontentiĝi je surogatoj, eventuale miksitaj kun iomete da vera kafo. Kontraste, botelo da brando, bona vino aŭ likvoro estas aĉetebla por nur 200–300 din. ! Stranga situacio, ĝis oni memoras, ke la vinberoj estas unu ĉefa produktaĵo de la lando.

Frapa estas la granda intereso por kulturaj aferoj. Neniam mankas publiko por kulturaj filmoj, teatraj prezentoj, muziko, ekspozicioj de pentro-arto, kaj en tiu lasta menciinda estas la oftaj ekspozicioj de junartistaj verkoj kie malkovriĝas viglaj talentoj alportantaj belon en vivon kies tonoj ne ĉiam estas helaj.

Vespere sur la Placo Respubliko la homoj amasiĝas por rigardi la eksterdoman filmprezentadon, cetere senpagan. Alte sur fasado de placfrontanta domo blankas ekrano kaj el transplaca fenestro aparato projekcias rakonton de liberiga batalo, vivon de jugoslava poeto, aŭ epizodon el la historio de la popolo. Alitempe la laŭtparoliloj de la placo disaŭdigas programojn de la radio.

En restoracioj — kie cetere la germana ofte servas kiel helpa lingvo, la angla neniam — la eksterlandano havas okazon frandi en nova mondo. Supoj kun diversspecaj nudeloj, viandrizaĵoj, farĉitaj paprikoj, diversaj gulaŝoj estas bonvenaj aldonoj al la konataj kotletoj, bifstekoj kaj simile de nordaj landoj. Kaj neniu, veninte al Zagreb, devas maltrafi la indiĝenan *ĉevapĉiĉi* — spicitajn viandbuletojn kradrostitajn kaj kun hakitaj cepoj, kiun oni servas ne kun tranĉilo kaj forko, sed . . .

dentpikilo ! Ankaŭ ne la parencan *raznizi*, kradrostitajn pecetojn de porkviando sur stangeto ! Zagrebanoj kutime trinkas kun tiuj delikataĵoj “vinon ordinaran” kun sodakvo (!) sed mi favoras la malhelan bieron se ĝi estas havigebla. La servado en restoracioj ĝenerale ne estas altnivela kaj neniel komparebla kun servado en samnivela restoracioj en — ni diru — Francujo, Germanujo kaj Skandinaviaj landoj. En la malmultaj unuarangaj restoracioj oni kompreneble povas atendi internaciajn normojn de servado.

Por okcidentanoj la urbo fremde impresas. La solide konstruitaj domoj havas kazernecan aspekton kaj multloke bezonegas riparojn. Ĉio, ĉe la domoj kaj en la domoj, spegulas la oferojn faratajn por la konstruo kaj rekonstruo de granda industria potenco per kiu stabiligi la ekonomion de la lando. Estus granda eraro forporti de la lando nur la supraĵajn impresojn de mallonga vizito. Por iom, nur iom, kompreni la situacion en ĉi tiu lando necesas studi la historion kaj la eventojn de la lastaj jardekoj. Nur kontraŭ tiu fono de okupado, milito, lukto, sufero, batalo kaj eljungiĝo oni povas ekvidi kaj ekkompreni la spiriton de la jugoslavo. Nur tiel oni povas kompreni kaj ŝati la pasian amon de la Zagrebano por sia urbo, por siaj tradicioj kaj la intimaj belaĵoj kiuj kune konsistigas lian vivon. La okazigo de Universala Kongreso en ĉi tiu urbo donas al la Esperantistaro unikan okazon ekkoni fremdan kulturon kaj ekami simpatian popolon.

Nia Forumo

PAROLAS LA LEGANTOJ

Korespondantoj nepre esprimu sin koncize kaj mallonge. Antaŭ ol sendi leteron por publikigo kontrolu la longon per komparo kun jam presita teksto.

Presigo de letero de korespondanto ne necese signifas ke U.E.A. oficiale subtenas la esprimitajn opiniojn.



Kunigo de urboj

Ekzistas nun Eŭropa federalista movado, kiu agadas por la “ĝemeligo” de Eŭropaj urboj. La gvidantoj de tiu movado opinias—kiel ni—ke la porpacaj kaj amikaj rilatoj ne devas esti nur la tasko de la diplomatoj.

Inter la du urboj tiel unuigitaj oni organizas ĉiuspecajn rilatojn: korespondadon, festojn, kulturajn manifestaciojn, ekspoziciojn, vojaĝojn por junuloj, samprofesiuloj, k.t.p.

Se, bonŝance, ekzistas en la du urboj aktivaj Esperanto-grupoj, oni tuj ekvidas la gravan propagandan profiton kiun ili povas eltiri el tiu “ĝemeligo”, partoprenante en la diversaj agadoj, aŭ eĉ iniciatante interesajn taskojn. Pro tio, estas dezirinde ke niaj naciaj kaj lokaj organizaĵoj atentu tiun novan movadon.

A. Frangeul, Angers, Francujo.

Interesa propono

Kial ne sugestu al membroj de UEA, ke se ili ne povas partopreni universalan kongreson, ili abonu la landan gazeton por sekvi la novaĵojn; ekzemple, dum 1952 mi abonis *Norvegan Esperantiston* kaj multe ĝuas legante ĝin. Pripensu, se unu-du centoj da personoj estus tion farintaj, certe ili same estus trovintaj plezuron el tio, kaj la norvegoj estus povintaj

eldoni pli bonan kaj belan gazeton dum la jaro.

William P. Vathis, Hongkongo.

Pri nia revuo

Mi gratulas vin pro la nuna formato donita al la revuo *Esperanto*, kiu estas tre alloga. Ankaŭ plaĉas al mi la informo pri estontaj 48-paĝaj numeroj, sed eble al la esperantista publiko pli plaĉos, anstataŭ dikega revuo, konstanta organo; t.e. ricevi dek du similajn numerojn dum la jaro. Ĝuste dum ferioj, kiam ni ĉiuj havas pli da libera tempo, mankas la revuo!

Kiel rimedi ĉi tion? Mi ne scias, sed montras nur la fakton. Eble la aŭgusta numero povus esti pretigata antaŭ tiu monato sen aktualaj rubrikoj. La afero aspektas malfacila, sed enketo eble pruvos la saman senton je multaj membroj.

Adolfo Garés, Hispanujo.

Ricevitaj (petante, skribu nur en Esperanto kaj atentu la leteron sur p. 217—1952).

Thun, Svislando: 10-paĝa 15×10.5 cm. turisma faldprospekto, bele ilustrita, kun interesa teksto. Petu ĉe la Delegito de U.E.A., S-ro Fritz Schwarz, Wiesenstrasse 1, Thun, Svislando.

Promenado tra malnova Gent, faldprospekto pri ĉi tiu bela urbo kun urboplano kaj praktike aranĝita gvidilo por fremdulo dezirante konatiĝi kun la vidindaĵoj sen gvidisto. Petu ĉe Oficiala Informoficejo, Halle-Belfort, Gent, Belgujo.

Deĉjo Takaĉ :

La mistera paketo

(El "Vivanta gazeto" de la klubo Bude Borjan en Zagreb, 21 Novembro 1952.)

ANTAŬTAGMEZE mia studado estis ĉesigita per la agrabla sciigo de mia leterportisto, "Nun ĝoju, ĉar iu el viaj *eksperantistoj* sendas al vi paketon kiun vi povas jam hodiaŭ preni ĉe la poŝtejo !"

Ferminte la pordon mi tuj esploris la ricevitan ĝojigan sciigon kun kiu, bedaŭrinde, estis ligita ankaŭ la ĉekenpagilo por ducent dinaroj.* Kompreneble, ke mi tuj iom malpli ĝojis, sed kion fari ? La paketo venis kaj dum kvin tagoj oni devas la sendaĵon elpreni el la doganejo. Almenaŭ tiel severe estis skribite en la fino de la sciigo.

Kunportante ĉiujn eblajn dokumentojn kiujn mi konjektis bezonataj por tiel grava evento kiel estas ricevo de paketo el la eksterlando, mi survoje al la poŝtejo meditis : "Diable, kiu povus esti tiu, kies paketon mi hodiaŭ ricevos ?" Mi ja havis du-tri, eĉ kvar, konatojn en tiu lando de kie ĝi venis, sed jam dum pli ol jaro inter ni ne estis ia ajn kontakto. Eble mi gajnis premion en ia Esperantista loterio aŭ konkurso ! Tamen, ja pacienciĝu. Post kelkaj minutoj la vualo de la sekreto estos for . . .

Mi baldaŭ atingis la ĉefpoŝtejon kaj laŭ sciigo de la deĵoranta pordisto mi enviciĝis en sufiĉe longan vicon por pagi la imposton. Antaŭ mi troviĝis deko da homoj kaj plaĉa sinjorino parolis kun sia najbaro antaŭ ŝi staranta. "Tamen tiuj doganpagoj

* Por ĉiu enveninta paketo en Jugoslavujon oni devas pagi imposton de 200 din. eĉ antaŭ ol vidi la paketon (=proks. 10% de semajna salajro de laboristo).

por enportita varo estas tro grandaj. Imagu, mi hieraŭ ricevis pakon kun nur tri brakhorloĝoj, dudek paroj da nilonŝtrumpoj, iom da lipŝminko kaj 30 fontplumoj, kaj tiuj malicaj doganistoj ordonis ke mi pagu 43 mil dinarojn por imposto ĉar laŭ ili la tuta vararo estas *luksaspeca* !"

Timigite per tiu informo mi hezitis. Mi ja esperis, ke mia nekonata paketo-sendinto ne sendis pezan pakon kun luksa varo ! Veninte al la giĉeto mi fiere enpagis la sumon kaj tuj rapidis al la teretaĝa oficejo por preni mian paketon. Granda estis mia konfuzo vidante ke tie jam aro da homoj atendas siajn paketojn. Kun plej paciencaspekta mieno mi kuraĝe enviciĝis kun la espero, ke ĉio iros bone.

Post doganista kontrolo de la pakenhavo homoj seriozmiene reenvolvigis la karan posedaĵon por urĝi hejmen kie oni povos detale esplori kaj analizi la internon de la sendaĵo. Dum mi malrapide proksimiĝis al la celo de la atendado, la giĉeto ĉe kiu oni transdonis la varojn de tempo al tempo elvomis diversajn pakojn kaj paketojn, malgrandajn rekomenditajn leterojn, grandajn lignajn barelojn, papervolvajojn, rondformajn ujojn kaj simile. Kion mi ricevos, mi pensis ? Kiel peza estos mia sendaĵo ? Ju pli proksime mi estis des pli ofte stariĝis tiuj demandoj.

Atinginte la giĉeton kiun estris ĉarma sed severa oficistino mi estis demandita : "Vi loĝas en B . . . 24. Kiel estas ke sur la paketo estas skribita n-ro 2 ?"

“Jes, jes . . . verŝajne la sendinto forgesis la ĝustan adreson. Mi ja estas la sola Takaĉ en tiu strato. La paketo certe estas al mi sendita”.

La oficistino komencis koleriĝi. “Ha bone. Mi konas tiujn erare skribitajn adresojn. Tiel vi volas trompi la doganistojn por ke vi povu dum unu monato ricevi pli da valoraj sendaĵoj !”

Mia tuta honesto kontraŭis. “Je diablo, fraŭlino ! Tio apenaŭ estas la dua sendaĵo kiun mi ricevis el eksterlando en mia tuta vivo ! Ho, pardonu min. Tamen estu tiel bona doni al mi la paketon. Certe estas en ordo”.

Iom kvietiĝinte ŝi diris : “Sole kion mi povas proponi al vi estas, ke vi iru al la ĉefo en la unua etaĝo. Kiel li decidis, tiel mi faros, ĉar sen lia permeso mi ne rajtas transdoni al vi la paketon”.

Kun duonlaŭta “bone” mi forlasis la giĉeton kun la severa oficistino kaj mia karega sed malgranda paketo. Kaj la sola, kion mi povis konkludi estis “Certe io valora !”

Enirinte la ĉambron de la ĉefo kaj vidante lin iom malbonhumora miaj genuoj komencis tremi. Mi tamen kuraĝigis min per “Nu antaŭen, la paketo devas esti via !” Post mia rakonto pri la tuta afero la severa ĉefo en olive verda uniformo respondis : “La komplikaĵo estos tuj for, se vi povos nur diri kiu sendis la paketon !” Samtempe li prenis la telefonon kaj demandis : “Esploru, mi petas, kiu estas la sendinto de la paketo por S-ro Takaĉ”. Post iom da atendado kaj mallaŭta papersusurado de la alia fino de la drato venis respondo, kiu ankoraŭ pli malbonhumorigis la ĉefon. “Bela afero !” li elkraĉis. “Ne ekzistas la nomo de la sendinto. Sciu, ke se vi transprenos

la paketon kaj poste oni konstatos ke ĝi estos por alia persono vi povos esti severe punata. Diru sincere, ĉu aŭ ne la paketo estas via. Se jes, prenu ĝin kaj ĉio en ordo, sed se ne . . . ve al vi !”

Post mia solena “Jes”, mi forlasis la ĉambron kun ekspiro ĝojplena. “Finfine”, mi diris al mi, urĝante al la giĉeto kun ĝia deĵoranto ĉarma sed severa. “Certe ĉio nun estas en ordo ?” mi demandis al ŝi.

“Ne”, ŝi respondis. “Vi devas enveni en la oficejon kaj fari protokolon pri la enhavo de la paketo !”

Jam tute kolera mi furioze enpuŝis min en la homamason por atingi la pordon de la oficejo kaj mi sentis ke min sekvas la rigardoj de ĉiuj homoj en la vico. Kia protokolo ? Jam unu horon mi atendis kaj dume estis prenita centoj da paketoj kaj pakoĵ sen ia ajn protokolo. Kial ĝuste mi !”

Al mi alpaŝis fortega poŝtisto kaj donante al mi malgrandan koverton diris : “Ĉar la enhavo de via paketo estas vere stranga vi devas subskribi kion vi ricevis por ke vi poste ne povu diri, ke io mankis”. Per tremantaj manoj, disŝirante la firme gluitan tubforman envolvadon mi pensis al mi, “Kio povas enesti ? Kio ene troviĝas ?” Formetante senpacience la lastajn paperpecojn mi malkovris antaŭ mi belan maldikan ruĝkoloran . . . kandelon ! Mi turnis du-trifoje la paperaĵojn esperante trovi ankoraŭ ion. Kaj jen vere mi trovis ŝablonitan skribaĵon kun la jeno : “Ni aranĝas ‘Feston de kandeloj’ dum Zamenhof tago, kaj ni ĉirkaŭ Kristnaska arbo bruligos la ricevitajn kandelojn kaj kantos Esperantlingve. Bonvolu sendi al ni saman kandelon.”

Preskaŭ sveninte mi subskribis la protokolon kaj ekiris hejmen. Dum

la tuta irado mi vidis la ridegantajn vizaĝojn de la homoj en la vico, kaj unu maljunulo kun griza ĉapo diris, “Bonega spritaĵo! Bonega ŝerco!” Dum longa tempo mi aŭdis la ridadon kaj kvazaŭ bestaĉo en sonĝo min turmentis la rido.

Mi demandas min, kial la Esperantistoj tra la mondo elpensas tiajn strangajn aferojn kiaj ridindigas nian aferon, kaj anstataŭ kultura internacia kunlaboro sin okupas pri poŝtmarkoj bildflanke kaj organizas “festojn de kandeloj”?

* * *

Postskribo de la redaktoro: Bedaŭrinde ĉi tiu rakonto estas vera. Post la rakonto la verkinto montris la kandelon kaj la koverton en kiu ĝi estis sendita. Ni kaptas la okazon denove emfazi, ke nia afero estas serioza kaj precipe pri la Universala Kongreso en Zagreb la Loka Kongresa Komitato insistas, ke tie nepre ne montriĝu ia ajn strangaĵo aŭ frenezaĵo kiu povus kompromiti la kongreson antaŭ la publiko.


Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

UNESKO lastatempe agnoskis I.L.E.I. kiel ne-registaran organizaĵon kun kiu ĝi havas regulajn interrilatojn pri aferoj komune interesaj.

La plano por “Lernejaj Familioj” jam funkcias, kaj nun estas pli grandigita por ampleksi individuajn petojn pri korespondado de lernejoj kaj lernejaj instruistoj. Vidu *Esperanto*, p. 258 (Oktobro, 1952) por reguloj.

La decembra numero de *Esperanto et Culture*, havebla kontraŭ respond-kupono ĉe S-ro Dumarquez, La Dometo, Anzin-St.-Aubin, par ARRAS (P. de C.), Francujo, enhavas la informan sekcion de I.L.E.I., kun plena raporto pri la kunveno en Oslo, “Puno en la lernejo”, kaj la tekston de la eksperimento pri la instruado de la franca kaj esperanta lingvoj en la temaro de angla duagrada popol-lernejo.

V.C.N.



La nacia teatro—Zagreb

M. de Waard :

Portland — cemento

La betonepoko.

Unu el la plej gravaj materialoj de la moderna konstrutekniko estas la *cemento*. Jam ne estas eble imagi konstruaĵon, ĉu en la civila aŭ en la hidroteknika sektoro, por kies realigo oni ne uzis grandskale la cementon, la ligilon en la “armita betono” (ferbetono). Kelkfoje oni ja aŭdas la mokon, ke post la ŝton- kaj ferepoko la homaro vivas nun en la *betonepoko* !

Betono—eble ne necesas la klarigo—estas miksaĵo de sablo, ŝtonetoj (siliko) kaj cemento, dense kirlitaj en akvo ĝis ekestas gluema kaĉo kiu, verŝita en antaŭe preparitajn lignajn formojn, post mallonga tempo malmoliĝas kaj—danke al la *armigo* per ŝtalaj stangoj—ekposedas la kapablon porti pezajn ŝarĝojn.

La kunliga forto en la betonkaĉo, la ligilo do, estas la cemento. Kio estas tiu cemento kaj de kie ĝi devenas ?

La sekreto de Aspdin.

En la jaro 1824 la anglo Jozefo Aspdin ricevis patenton pri sia eltrovaĵo : produktaĵo, akirita post bruligo alttemperatura de miksaĵo, kiu konsistas el kalko kaj argilo. La koloro de tiu miksaĵo multe similis la koloron de kalkŝtono, trovebla en la angla regiono *Portland*. Pro tio la nova produkto ricevis la nomon *Portlandcemento*, kiun ĝi konservis ĝis la nuna tempo. Estas do miskompreno opinii, ke Portlandcemento (mallongigo : p.c.) estas speciala speco de cemento, devenanta el Portland.

Kvankam la ĉefaj principoj de la cementfabrikado restis la samaj,

tamen la scio pri la materialo kaj la teknika fabrikado multe ŝanĝiĝis en 125 jaroj. Same multe ŝanĝiĝis la cementfabrikejoj kompare al la laborejo de la iom amuza William Aspdin, filo de la eltrovinto, kiu ĉirkaŭis—en 1843—sian fabrikejon per muro, alta ses metrojn, por ke neniu scivolemulo ĵetu rigardon en la “kuirejon”. Ankaŭ siajn laboristojn li lasis sensciaj pri la konsisto de la materialo, kiun ili produktis.


La vera triumfo, la venko de la cemento, komenciĝis post 1849, la jaro de la eltrovo de armita betono, al kiu eltrovo estas ligita la nomo de la franco *Monier*. En preskaŭ ĉiuj landoj, sed antaŭ ĉio en Anglujo, Francujo, Germanujo, Belgujo, Svislando kaj Usono oni fondis fabrikejojn por la moderna konstrumaterialo.

Por ke oni havu komprenon pri la produktkvanto jen sekvas kelkaj ciferoj. La tutmonda produktkvanto en milionoj da tunoj (unu tuno = 1000 kg.) sumiĝis :

en 1850	..	0.068
en 1880	..	1.7
en 1930	..	80.—
en 1940	..	147.— (militpreparo !)
en 1950	..	130.—

La fabrikado.

Ĉar la kalciokarbonato—la kalkŝtono aŭ kreto—estas la ĉefa krudmaterialo por la fabrikado, kaj ĉar oni bezonas grandegajn kvantojn da ĝi, estas klare, ke oni fondas cementfabrikejojn prefere tuj apud la trovejoj de tiu kalkŝtono por eviti tiamaniere altajn transportkostojn. Krome oni serĉas tian situon, ke



SKEMO PRI CEMENTPRODUKTADO

ankaŭ grava trafikvojo estu proksima. En Nederlando oni preferas apudan riveron aŭ kanalon por ŝipe transporti la amasan pretan produkton.

Cemento, la ĝenerala nomo por “portlandcemento”, dankas sian gravan rolon en la moderna tekniko al sia ĉefa karakteriza eco: kiam oni malsekigas ĝin per akvo, ĝi—ĉu sola aŭ miksitaj inter sablo kaj siliko—malmoliĝas. Tiu malmoliĝa procedo efektiviĝas sufiĉe rapide. Depende de la kvalito de la cemento la malmoliĝo bezonas periodon de kelkaj horoj ĝis kelkaj tagoj. Per esploroj oni tamen konstatis, ke tiu malmoliĝo kontinuas eĉ dum pluraj jaroj. La teknikistoj parolas pri “rapida” kaj “malrapida” cemento.

La fabrikado de Portlandcemento konsistas ĉefe el tri sinsekvaj fazoj:


1. Prepari la krudmaterialon kaj la karbojn kaj efektivigi akuratan

miksadon kaj mueladon de kalkŝtono, argilo kaj eventuale piritcindro.

2. Fabriki la cementskorion: tio estas densa kaj malmolega produkto, naskita per la cindriĝo de la supre nomita miksaĵo en t.n. ŝaktforno aŭ turnforno je temperaturo de ± 1450 gradoj celsiusaj.

3. Mueli la malvarmiĝintan cementskorion, aldonante malgrandan kvanton da gipso nebruligita. Ĉi-lastaj okazas por reguligi la koaguliĝtempon, t.e. la periodo, kiun la cemento bezonas por malmoliĝi.

La cementforno ne malprave nomiĝas la koro de la fabrikoj. En la modernaj fabrikejoj estus pli ĝuste paroli pri fornego. Sur la fotografiaĵo oni vidas la ĵus finkonstruitan fornego de la nederlanda cementfabrikejo E.N.C.I. La “tubo” estas longa 120 m., la diametro interna estas 4 m. En tiu koro la sinsekvo de la



internaj reakcioj dum la cindrigo kaj malvarmiĝo estas decida pri la bona aŭ malbona kvalito de la produktita cemento. La ceteraj agoj estas ja nur afero de preciza kaj akurata laboro: ĝusta elekto kaj porciigo de la krud-materialoj kaj ties intermiksiĝo kiel eble plej perfekta.

Ĝis 1900 oni aplikis preskaŭ senescepte *ŝaktfornojn*, t.e. starantaj fornoj, en kiujn oni metis alterne tavolon da kalkŝtono kaj da karboj. Iom post iom oni anstataŭis tiujn ŝaktfornojn per ne tute horizontale kuŝantaj fornoj: la *turnfornoj*. Ĉe la plej supra fino de la tubo oni enmetas la cindrigotan materialon. Ĉe la kontraŭa fino oni enblovas la karbojn en formo de pulvoro. Meze en la forno troviĝas la brulzono.

En la komenco de la dudeka jarcento tiaj turnfornoj havis longecon inter 20 m. kaj 35 m. La diametro estis dumetra. Per tia forno oni produktis po ± 50 tunoj tage. La forno videbla sur la fotografaĵo produktas nuntempe po 700 tunoj tage!

La kuŝantaj turnfornoj havas grandan avantaĝon super la malmodernaj ŝaktfornoj. Ili estas uzeblaj kaj por la "seka" kaj por la "malseka" procedo; ili havas pli grandan produktkapablon kaj krome ili liveras produkton de pli konstanta kvalito.

La dudeka jarcento : la cementjarcento.

Sian triumfon la cemento dankas—mi jam diris tion—al la eltrovo de la betono, precipe de la armita betono. Per la betontekniko la cemento forpuŝis ĉiujn aliajn konstrumaterialojn kaj mem fariĝis la ĉefa ŝtofo por la konstruisto. Betono estas

pli kaj pli uzata; ĝi posedas ĝis nun nelimigitajn eblecojn. Danke al la pli kaj pli perfektigita cemento la arkitektoj kaj konstruistoj trovis per la armita betono eblecojn, kiuj kaŭzis veran revolucion en la tradiciaj konstrumetodoj.

"Konstrui estas la plej kompleta natura agado de la homo", kaj ĉe tio la cemento montriĝis ema adapti sin al la plej aŭdacaj kapricoj de la konstruisto. Intima kunlaboro inter kreanta artisto kaj klarvida teknikisto scios efektiviĝi morgaŭ konstruaĵojn, neimageblajn hodiaŭ. Tial tute prave oni nomas nian epokon la cement-kaj betonepoko. La kolosa maso de akvobarilego, la gracila silueto de preĝeja turo aŭ fabrikkamentubo pli-ol-centmetra, la harmonia volbaĵo de ponto, la nevideble altaj nubskrapuloj, ĉiuj tiuj kreaĵoj de nia epoko ne estus realigeblaj sen la armita betono, do... sen la cemento.

Tiamaniere la eltrovaĵoj de Aspdin kaj Monier fariĝis beno por la homaro, al kiu la cemento—pere de la betono—havigis perfektajn domojn, pontojn kaj multajn aliajn utilajn konstruaĵojn. Bedaŭrinde nur, ke ankaŭ la militaj inĝenieroj ekspluatis la betonon: "bomboliberajn" fortikaĵojn ili konstruis kaj ŝirmejojn nedifekteblajn per la plej fortaj bomboj.

Fine mi atentigas vin pri tre utila apliko de la cemento en ege malgrandaj kvantoj: la dentisto plenigas per ĝi parte la truojn en viaj dentoj!

* * *

La ilustraĵoj estas reproduktitaj pro afabla permeso de E.N.C.I., la nederlanda cementfabrikejo.

J. M. Toorneman :

Legendo de la Preĝejo surmonta

En la centro de Okcidenta Eŭropo situas malgranda sed grava landeto, nome Nederlando. Ĝi estas trasulkigita de nombro da riveregoj, kiuj havas ĉi tie sian elfluon en la Nordan Maron.

Sur la dekstra bordo de la rivero Ysel, unu el la branĉoj de la Rejno, etendiĝas la urbo Deventer, en la Mezepoko tre potenca komercloko de la Hansa Ligo, nuntempe movoplena industriurbo kun pli ol 42.000 loĝantoj.

En la sudorienta parto de la malnova kvartalo troviĝas monteto, sur kiu staras preĝejo kun du turoj, konstruitaj en la 13a jarcento.

La popolkredo asertas, ke ambaŭ ne havas saman alton, sed tio estas nur videraro. Laŭ la tradicio la preĝejo estas fondita per la mono postlasita de kompatinda fraŭlino.

Ŝia nomo estis Marta, kaj ŝi havis egalaĝan fratinon nomitan Beatriks. La ĝemelinoj estis preskaŭ egalaj, sed unu estis iom pli altstatura ol la alia. Ili dormis en unu ĉambro, ili vizitis kune la preĝejon kaj kutimis promeni brakon en brako. Ili tre amis unu la alian, interdisputis neniam, kaj estis tre feliĉaj.

Sed la situacio aliĝis, kiam iu juna, belega kavaliro venis en la urbon kaj konatiĝis kun la dunaskitinoj. Kiam li rakontis pri siaj aventuroj, ambaŭ fraŭlinoj aŭskultis kun brilantaj okuloj.

Ne mirege do estis, ke ĉiu el la du enamiĝis al la bela junulo, kaj ili ne diris la sekreton unu al la alia. Sed plej sopire nia kavaliro alrigardis

Beatriks. Kaj ĉi tiu kuŝis nokte, nedormante, ĉiam revante pri la bela junulo. Kelkfoje ŝi kredis aŭdi sian fratinon mallaŭte plorĝemante. Sed se Beatriks demandis alitage pri tio, Marta neis ĉiam la ĝemadon.

Iun vesperon Marta hejmeniris tutsole. Beatriks adiaŭis la karan kavaliron, kiu forlasis la urbon. Li promesis kunpreni estonte sian amatinon al la prapatra kastelo. Kaj la ravita fraŭlino profunde kaŝis en sia koro la dolĉan sekreton. Tamen, vidante la malĝojan vizaĝon de Marta, ŝi jam ne plu sentis sin sufiĉe forta, forlasi la fratinon.

Post kelkaj jaroj la kavaliro revenis efektive en la urbon ; sekrete li sendis altvaloran juvelon al Beatriks. Kaj tiam akra batalo komenciĝis en ŝia koro. La okulo de Marta ja diris : Restu ĉe mi, kara fratino, ne forlasu min ! Kaj samtempe la brilega ŝtono flustris : Foriru ! Kuniĝu kun tiu, kiu amas vin. Estu feliĉa dum via tuta vivo !


Kaj iom post iom la amo plifortiĝis, estiĝis eĉ pli forta ol la korinklino al la fratino.

En malluma nokto Beatriks ŝtelforiris el sia hejmo kaj ŝi diris pri tio nenion al siaj parencoj. Ŝi sciis ke la amato atendas ŝin ĉe la bordo de rivereto. Tie ŝi renkontis lin. Tuj la kavaliro levis ŝin sur sian ĉevalon kaj rapide ili kune forrajdis eksterlanden.

Marta restis sola en sia bona urbo Deventer kaj ŝi daŭre atendis la revenon de Beatriks. Ofte ŝi ekhavis larmojn en la okuloj pro sia fratino. Kaj multfoje ŝi iris ekstere de la urbo

por vidi, ĉu la forkurintino revenas. Sed ŝi atendis ŝin vane. Kaj tial ŝia sanstato malprosperis. Alvenis tempo, kiam ŝi ne plu povis forlasi la liton.

Kiam Marta sin sentis mortonta, ŝi venigis la pastron, rakontis al li la malĝojan historion kaj donacis sian posedaĵon al la paroĥo de Deventer. Ŝi testamentis, ke per tiu mono nova preĝejo estu konstruata sur la monteto, memore de la amata fratino. Kaj oni starigis, findiras tiu popolkredo, kun ĝi, du turojn, tute egalajn, escepte la alton, tiel memorigante la grandan amon de ambaŭ fratinoj, kiuj ne havis saman korpan longecon, sed treege amis unu la alian.



Deventer : la preĝejo surmonta

An Tóstal (Irlanda Printempa Festo) Aprilo 5-26, 1953

Irlando fieras pri sia pasinteco kaj pri siaj antikvaj kulturo kaj historio, kaj en la venonta printempo la registaro, kunlabore kun ĉiuj kulturaj, sportaj, turistaj kaj aliaj organizaĵoj en la lando, okazigos grandiozan feston, kiu respegulos tiujn historion kaj kulturon, kiel ankaŭ la atingojn de la moderna ŝtato. Al tiu festo ĝi elkore invitas alilandanojn de ĉiu mondparto.

La programo de la Festo enhavos la jenajn erojn :—

Malferma Tago kun kolorplenaj ceremonioj, paradmarŝoj k.t.p. ĉie tra la lando.

Spektaklaj historiaj paradoj prezentantaj scenojn el la pasinteco, seriozajn kaj gajajn.


Irlandaj dancado kaj koncertoj subĉielaj.

Dramoj kaj muzikaj prezentaĵoj unuagradaj. Ankaŭ internaciaj sporteventoj k.t.p.

Ĉiaj asocioj kaj kluboj partoprenos la Feston kaj ankaŭ la Esperantistoj aranĝos kunvenojn por samlingvanoj kaj volonte donos informojn kaj helpas rilate loĝejojn k.t.p.

La Festkomitato eldonas literaturon en angla, franca, hispana kaj germana lingvoj kaj eble ankaŭ en Esperanto se venos sufiĉe da informpetoj de Esperantistoj.

Ni petas, do, ke ĉiu kiu interesiĝas, kaj aparte tiuj, kiuj vizitos la Feston skribu al : Tóstal Komitato, c/o Dublina Esperanto-Klubo, 31 North Frederick Street, Dublin, Irlando. Ĉiu ricevos broŝurojn pri la Festo kaj Esperantlingvan folieton pri Irlando. Ni ankaŭ petas tradukon nacilingven por via gazetaro kaj sendon de eventualaj eltiraĵoj.



Tra la Libraro

Duope ricevitaĵajn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevas nur mencion.

*=akireblaj ĉe U.E.A.

*Recenzoj enhavas la proprajn opiniojn de la recenzintoj.
Ili ne necese estas laŭ la oficiala starpunkto de U.E.A.*

***La Alia Pasinteco** de Rico Bulthuis, el la nederlanda originalo tradukis Julia Isbrucker. Eld. Internacia Esperanto-Instituto, Nederlando. 292 paĝoj, 20 × 13cm. Prezo bind. 11 ŝil., afranko 6p.

Ĉu ni sopiras la senzorgon de la primitivulo, kiam la civilizo tro premas, kaj ĉu ni iufoje ĝin atingas per la memorperdiĝo? Tiu kaj similaj demandoj leviĝis en mia menso dum mi legis ĉi tiun pensigan romanon, verkitan de la plej juna filo de nia konata H. J. Bulthuis. La polico suspektis, ke viro ŝajnigas perdon de la memoro, sed post esploroj, ili transdonas la sennomulon al instituto por nervmalsanoj. Tie, kiel "Toon la ĝardenisto", li unue sentas sin feliĉa, sed baldaŭ, serĉante sian pasintecon, li pli kaj pli maltrankviliĝas. Du kuracistoj lin rekondukas al normaleco kaj fine la viro rekonas sian veran nomon kaj malkovras la kaŭzon de sia amnezio.

La historio disvolviĝas kiel bona detektivromano kaj la aŭtoro montras sin kompetanta rakontisto. Majstre li priskribas, ekzemple, la okazon, kiam Toon senkonscie riparas radioaparaton kaj per tio donas valoran informon pri si. Fakte, tiel interesa mi trovis la enhavon, kiu baziĝas sur veraj okazintaĵoj, ke mi ne volis formeti la libron ĝis mi estis leginta la lastan paĝon. Sed tio atestas ankaŭ la altan nivelon de la traduko. Detalojn mi ja povus kritiki, sed ĝenerale la tradukintino per koncizaj

kaj kelkfoje lakonaj frazoj sukcesas redoni la stilon, kiu verŝajne karakterizas la originalon.

La libro estas bone presita kaj bindita kun alloga ekstero. Ĝi estas ĉiel rekomendinda.

C. D. A. Capp.

Transiro per diferencialaj ekvacioj de probablodensoj al karakteriza funkcio kaj inverse, de Olav Reiersøl, Oslo. *Portugaliae mathematica*, Vol. 10, Fasc. 2—1951. p. 71–80 : 10 p. (kun anglalingva resumo).

Ree nia samideano Prof. Reiersøl donas al ni priskribon de matematika teorio rilatanta al probablodensoj kaj karakteriza funkcio. Nia kolekto de efektive sciencaj disertacioj kaj tezoj pliriĉiĝas per tio kaj estus dezirinde ke scienculoj, precize anoj de la ekzakta scienco, penus ellabori traktaĵojn en nia lingvo. La specialeco de tiu ĉi laboraĵo estas ke ĝi, male je aliaj, estas verkita **en Esperanto kun angla resumo**. Ni devas danki la verkinton pro lia konstanta atento rilate je Esperanto, kaj ni ne dubas ke ni ricevos ankoraŭ pliajn laboraĵojn de li.

H.J.

Norvega Esperantisto, Oslo. Kongresnumero. 16-paĝa, bone ilustrita kun kongresraporto. Prezo afrankite n.kr. 1.10 (aŭ du internaciaj respondkuponoj) ĉe Eldonejo Esperanto A/S, Boks 942, Oslo, Norvegujo.

F. G. Rayer :

La Fremda Semo

Dum eonoj la fremda semo jam vojaĝis inter stelaroj, blovpelite kun la pulveretoj de interstela spaco. Malrapide, pro nova pezoforto, ĝi ekmoviĝis en la direkto al varmega, flava suno, kaj en la orbiton de unu el la ĉirkaŭirintaj planedoj. La semo pli rapide moviĝis, malrapide atingante la teroglobon, kie verdaj kamparoj kaj bluaj maroj briletis sub la suno.

La semo estis plenaĝa ; la kreskaĵo sur kiu ĝi kreskis jam floris kaj mortis kiam la planedo al kiu la semo alproksimiĝis estis ankoraŭ fandita . . . Tiel malpeza kiel disketo el papero, ĝi falis al la planedo, kaj ĝia rapideco malpliĝis kiam ĝi renkontis la supran atmosferon. Ĝi malsupreniris dum longa tempo, flirtante tra la aero dum multaj horoj. La krepuska rando de la planedo moviĝis malrapide antaŭen, kaj la semo falis tra mallumeco. Homa okulo ne vidis ĝian venon . . . Neniu homo sciis, ke ĝi venas. Fremda, kreskinta sur fremda planedo, la semo mem estis tute fremda al la planedo al kiu ĝi falis. Tre malgranda, preskaŭ travidebla, ĝi flirtis tra altaj nuboj kaj ensorbis la malseketon ; ĝia ŝelo—kiu jam estis malmoligita de la malvarmeco de interstela spaco—malrapide moliĝis . . . Sube, staris malgranda domo el ruĝaj brikoj . . . Arboj sur la montetoj apud balanciĝis pro la vento, kaj la semo dancis en la moviĝanta aero, kiel petalo tirita el blanka rozo. Ĝi estis blovpelita kontraŭ la tegmenton, super ĝian randon, kaj flirtis malsupren . . .

* * *

Alfredo Ravenloe apogis sin sur sia rastilo, lia vizaĝo pensema kaj liaj

bluaj okuloj esplorantaj la ĝardenon. Li jam faris multe da laboro tie ; ankoraŭ multe restis farota. Li ridetis al si ; la vilaĝanoj diris, ke li havas “verdajn fingrojn”. “Tion, kion Alfredo ne povas kreskigi, neniu povas kreskigi !” ili diris. Memorante, li ridetis. Multe plaĉis al li lia malgranda ĝardeno—lia terpeco, kie li laboris ameme.

Rastante la teron apud siaj piedoj, li rompis la malmolajn terbulojn. Li bone sciis kion lia edzino dirus : “Ja tro multe da tempo vi restas en tiu ĝardeno, Alfĉjo ! Kiom pli bone, se via laborado estus utila—”

“Kaj ĉu ne estas vere, ke ĝardenkultivado estas utila ?” li respondus. “Kiom plaĉos al vi miaj terpomoj, miaj legomoj— !”

Dum iom da tempo ŝi rigardus lin, kun manoj sub sia antaŭtuko, kaj poste reirus en la dometon. Ŝi estas ĉiam bonulino, Alfredo decidiĝis. Dum tridek jaroj ili estas geedzoj ; ĉiu plene sciis la kutimojn de la alia, kaj ili ne kverelis.

“Mi laboradas en la lignoseĝejo dum la tuta semajno,” li dirus, “kaj meritas mian distradon !”

Li enbuŝigis sian pipon kaj elspiris fumon en la Februaran aeron. La suno estis malalta, sed varmeta. Li jam plantis kelkajn vicojn de faboj, sur preskaŭ duono de la terpeco. Li formetis siajn ilojn en sian budon, purigis siajn manojn, kaj iris en la domon.

Lia edzino Mariono havas ŝiajn proprajn trajtojn, li konfesus. Sed tiaj ĉiam estas virinoj ! Bona edzino estis ŝi . . . ebla iom malŝparema, sed tiaj, ankaŭ, ĉiam estas la virinoj ! “Ili estas bonaj faboj, Alfĉjo,” ŝi

sendube diros, kiam li enportos la unuajn rikoltitajn . . .

Pli longaj printempaj tagoj venis, kaj Alfredo prenis sian sarkilon el la budo kaj laboris inter la longaj vicoj de faboj. Bone estas uzi la sarkilon ofte, li decidiĝis; tio haltigas la sekiĝon de la tero—

Lia sarkilo haltis. La klingo preskaŭ tranĉis verdan kreskaĵeton inter la vicoj. “Fabo,” li diris al si, “la eraresemitaj ofte plej bone kreskas . . .”

Kliniĝante, li rigardis zorge . . . La kreskaĵo ne aspektis tute kiel fabo; sed ĝi ja ne aspektis kiel kreskaĵaĉo kiun li devus forsarki. Ĝiaj folietoj estis preskaŭ travideblaj . . . Li sulkigis la frunton kaj lasis ĝin.

“Kion vi tiom fikse rigardis?” Mariono demandis kiam li eniris por temanĝi.

Alfredo gratis sian grizan kapon. “Nenion.” Neniam ŝi senkulpigus lin, se li dirus, ke li ne povas distingi inter fabo kaj kreskaĵaĉo! li opiniis.

“Nenion! Sed mi vidis vin rigardadanta!” ŝi rediris.

Li kirlis sian teon. “Ĝi estis nenio.” Ideo venis. “Ĝi estis nur malnova botel-kovrileto—mi eksupozis, ke ĝi estas monero!”

Poste, li ekzamenis la strangan kreskaĵeton denove. Li opiniis, ke ĝi ja kreskis plue dum lia foresto. Eble ĝi estas kreskaĵaĉo, li decidiĝis. Eble estus pli bone se li forsarkus ĝin antaŭ ol ĝi pli kreskos . . . Sed tion li ne faris, scivolema pri tio, kio ĝi estas.

Semajnoj forpasis kaj la kreskaĵo kreskis tiel rapide ke li ne plu povis ĝian ĉeeston kaŝi. Ĉiu povis ĝin tuj vidi, kaj Mariono estis sarkasma.

“Malnova botel-kovrileto!” ŝi diris. “Laŭ mia opinio, Alfredo Ravenloe, vi ja ŝajnigis, ke vi estas stultulo!”

Preskaŭ kun honto Alfredo rigardis la altan, strangan kreskaĵon. Multe pli alta ol la malgrandaj faboj, ĝi povus esti kardo—nur kardo, granda, alta kaj rapidkreska.

“Kion diros niaj najbaroj, kiam ili vidos kreskaĵaĉojn tiajn en nia ĝardeno!” Mariono demandis.

Alfredo decidis, ke ŝi ja havas iun el siaj “apartaj” malbonaj humoroj kaj estus bone ne disputi kun ŝi. “Mi forigos ĝin,” li diris.

Li prenis sian sarkilon kaj iris al la kreskaĵo. Jam tiel altkreska kiel li, ĝia trunketo estis dika kaj havis multajn bluajn folietojn. Li rigardis ĝin, reportis sian sarkilon al la budo, kaj elprenis hakilon . . .

Post dek minutoj li iris en la domon denove. “Ĝi ne havis tian aspekton, kian kreskaĵaĉoj havas!” li diris. “Miaopinie, ĝi ne estas kreskaĵaĉo!”

Mariono estis laboranta kun gladilo; ŝi ekvilibris la gladilon apud sia vango. “Ne kreskaĵaĉo! Kio, do, Alfred Ravenloe?”

Alfredo notis, ke ŝi uzis lian plenan nomon, kaj sciis ke li devas esti firma. Se ne, li baldaŭ venkiĝus!

“Miaopinie, ĝi estas kakto, Mariono!” li diris.

Ŝi gladis rapide, nekonvinkite. “Vi ja ne povas distingi inter utila kreskaĵo kaj kreskaĵaĉo, Alfredo Ravenloe!” ŝi diris.

Alfredo rigardis ŝin kun dignoplenta mieno. “Estas aferoj pri kiuj virinoj ne scias!” “La konvena loko por virinoj estas en la domo.” Li paŭzis signife, kaj aldonis: “Mi intencas lasi ĝin ĝis Herberto vidos ĝin.”

Li sciis, ke tio efektive finis la disputon: Herberto estis ilia tridekjara filo, lerta, scioplenta, kaj li estis ĵurnalisto en Londono.

La stranga kreskaĵo estis multe pli altkreska ol Alfredo kiam finfine Herberto vigle venis laŭ la vojeto al la ĝardeno. Herberto estis eleganta, vigla, rapidparolema, kaj pala. Li balanciĝis sur la piedoj kaj diris, ke la kreskaĵo estas strangega kaj miriga novaĵo. Li ĝin fotografis, kaj la sekvantan semajnon Alfredo trovis ĵurnalon sur la tablo kiam li matenmanĝis. Li malfermis ĝin kaj legis: “Suda-Provinca fenomeno konfuzas la ĝardenkultivajn spertulojn !”

Tio estis la komenco. Rapide la kreskaĵo pliiĝis kaj laŭ beleco kaj laŭ grandeco. Iom malĝoje Alfredo forigis la fabojn kaj la kreskaĵo staris sola kaj grandioza meze de la sarkita terpeco. Spertuloj venis, sekvataj de ĵurnalistoj kaj fotografistoj. Unue, Alfredo trovis, ke iliaj multaj demandoj estas ĝenaj, sed li trovis, ke li povas malantaŭen apogi sin komforte en sia malnova seĝo kaj eldiri frazon kiu ĉiam estas sufiĉa.

“Mi ne volas ion diri pri ĝi,” li dignoplene diris.

La spertuloj priparolis la aferon inter si, kaj kun la vilaĝanoj—kaj kiel fama Alfredo iĝis. “Ha,” la vilaĝanoj diris, “Alfredo havas verdajn fingrojn ! Kion Alfredo ne povas kreskigi, certe estas, ke tion neniu alia kapablas kreskigi !”

Sekrete Alfredo neniam ĉesis miri pro la beleco de la stranga kreskaĵo. Altkreska je ses metroj, ĝiaj supraj foliaroj briletis kiel arĝento. Ĝi jam burĝonis, kaj li prenis ŝtupetaron kaj sidis sur la supraĵo, rigardante la branĉetojn.

Pli da homoj venis. Alfredo trovis, ke mono venis, ankaŭ—unue ŝilingoj, sed poste pundoj. “Tio estas pro la lerteco de Herberto,” li diris al Mariono.

La pundoj venis pli rapide : dankmono pro permeso eniri ; ĉekoj, mirige grandaj, por intervjuoj kun ĵurnalistoj, kiuj per miloj da vortoj, sciigis, ke Alfredo havas nenion kion li volas diri. Tamen, la ĵurnalistoj sugestis, ke li povus diri multon pri la stranga kreskaĵo, *se li volus*. Oni metis palisaron ĉirkaŭ la ĝardeno, por teni ekstere knabojn kiuj sopiris suprengrimpi en la mirindan arbo-similan kreskaĵon. Sperteguloj rigardegis ĝin, kaj mirante foriris. Iuj el ili petegis Alfredon, ke li malkaŝu al ili, kie li havigis la kreskaĵon.

“Nenio estas, kiun mi volas diri,” li dignoplene diris, kaj elspiris tabakfumon en la someran aeron.

Li ĉesis labori en la lignosegejo, restante zorgisto de la kreskaĵo. Ofte Herberto venis kaj restis dumnokte kun ili. “Filmkompanio en Nova Jorko volas fabriki filmon pri ĝi,” li diris. “Mi sciigis ilin, ke granda Brita filmkompanio ankaŭ volas tion fari !”

Kinistoj venis kun multaj helpantoj, kaj la vilaĝo miregis. Brilega sunlumo brilis sur la kreskaĵon, kaj Alfredo, kiu ofte rigardadis ĝin, eldiris gravan frazon.

“Atendu, baldaŭ ĝi floros !” li diris.

La kinaj spertuloj loĝis en la apuda urbo, kaj ĉiu hotelo tie estis tutplena. La kreskaĵo floris—grandegaj skarlatataj floroj kies eksteraĵoj estis brile flavaj. De sia ŝtupetaro Alfredo ekzamenis ilin, kaj la kino-kameroj zumis.

“Por ĉi tiu filmo ili pagos al ni mil pundojn,” Herberto diris tiun vesperon, kaj Alfredo tiel miregis, ke li restis silenta.

Mariono—nun senzorge malŝparema—iufoje ĝenis lin. Ŝi dungis

servistino, kiu ĉiam malfermis la pordon, kaj nomis Alfredon “S-ro Ravenloe.” Portante novajn vestojn, Mariono rigardetis de malantaŭ siaj novaj kurtenoj, vere kiel nobelino. Unu nokton, kiam la mil pundoj estis enbankigitaj, Alfredo severe parolis al ŝi pri ŝia malŝparemeco.

“Ni ne elspezos eĉ unu pundon el tiuj mil pundoj, Mariono,” li diris.

“Sed venos al ni pli—multe pli!” Mariono ekkriis. “Herberto diris, ke ĉi tiu kreskaĵo estos mirindaĵo dum multaj jaroj! Ĉi tiu estas nur komenco, li diris!”

Unufoje dum lia tuta vivo Alfredo ne permesis, ke tiu ruzo venku lin. “Herberto ne scias pri ĝardenoj kaj kreskaĵoj!” li diris. “Li priatentu sian aferojn kaj mi priatentu tiujn, pri kiuj mi scias!”

Li ne plie parolis. Ekster la domo la floroj brilis mirinde bele en la arĝenta lunbrilo. Dum longa tempo li staris apud la fenestro, rigardante ilin.

* * *

Dum la tuta somero homoj venis multope por rigardi la kreskaĵon, kaj ĉiu miris. Bone konataj ĵurnalistoj sendis spertulojn kiuj ekzamenis la kreskaĵon; ili ĉiuj diris, ke ĝi estas nekonata de ili.

“Mi ja povus diri tion al ili!” Alfredo diris.

La floroj tiel brilis, ke doloris al la okuloj rigardi ilin. Semoj ekaperis, kaj Alfredo vidis, ke baldaŭ la bela florado ĉesos. Mariono petis, ke li donu al ŝi pli da mono, sed li skuis sian kapon. “Estas aferoj, pri kiuj virinoj ne scias,” li diris. “Mi scias tion, kion mi scias, kaj mi diris al vi, ke ni ne malŝparos tiun monon!”

Herberto parolis pri granda kontrakto por filmo tute kolorigita, farota dum la venonta printempo. “Kaj tiuj semoj!” li diris. “Ili estos multvaloraj!”

Alfredo skuis la kapon, sed la entuziasmo de lia filo daŭris. “Kiam la floradtempo denove venos, ni ĉiuj estos riĉegaj, patro,” Herberto diris.

La kreskaĵo faligis sur la teron malgrandajn semojn. Ĉiu estis simila al papera disketo, kaj preskaŭ travidebla. La spertuloj diris, ke ili estas ĉiuj nefekundaj, kaj neniam povos kreski.

“Mi ja povus sciigi tion al ili!” Alfredo diris. Li sciis, ke ĉiam li estas lerta pri aferoj tiaj. Ĉu la vilaĝanoj ne diris, ke li havas “verdajn fingrojn”?

La kreskaĵo iĝis bruna kaj faligis siajn foliojn. “Ŝajne ĝi ne kreskos dum la vintro,” Mariono diris. Ili estis solaj.

Alfredo elspiris grandan nubon da fumo. “Estas aferoj pri kiuj viro scias, kaj pri kiuj virinoj ne scias,” li diris. “La konvenaj aferoj, pri kiuj virino devus prizorgi, estas tiuj aferoj rilate al la hejmo! Estas pro tio, ke mi ne permesis al vi elspezi la monon. Tiu kreskaĵo jam kreskis, floris, kaj faligis siajn semojn. Tio estas la fino. Malforta kiel korko, ĝi estas. Post kelkaj monatoj nenio indikos, ke ĝi tie staris. Ĝi estas *unuajara* kreskaĵo, Mariono—*malbenita unuajara kreskaĵo*! Unuajaraj kreskaĵoj floras, faligas siajn semojn, tiam mortas!”

Li levis sin el sia seĝo, kolere sulkigis la frunton, kaj iris en la domon.

“Fulmotondro!” li diris al si. “Unuajara kreskaĵo! Kiel diable malbonŝance . . . !”

Ŝtefán Urban :

Poezio — Muziko

LA prelego “Horeto de Poezio” (en la kongreso en Oslo) enhavis la devizon “Poezio estas por la oreloj” ; kaj tio same valoras por la muziko. Ĝi ja estas devizo origine primuzika kaj ja tuŝas la muzikon pli ol la poezion. Dume ekzistas poezio destinita por deklamado kaj alia por la legado, la muziko tian distingon ne konas ĉar ĝi nepre devas esti aŭdata. Ekzistas valora subjektiva poezio t.e. verkoj tuŝantaj pli malpli privatecon. La muziko havas, ĝenerale, karakteron socian t.e. ĝi alcelas al pli vasta publiko.

Estus preferinde konsideri la fakton el nia Esperanta vidpunkto ĉar ni tiamaniere ricevas du malsamajn kulturendajn elementojn : unu kun aparta alcelo al la unuopulo (ekzemple poezian lirikon) kaj la duan destinitan vekti komunajn interesojn kaj sentojn (ekzemple specialajn signalojn, komunajn dancojn, k.s.) La tria elemento estas la mirinda kunigo de ambaŭ t.e. poezio kaj muziko en . . . kanto. Nun ni havas la feliĉan triopon poezio-muziko-kanto.

Ĝis nun la plej evoluinta estas la Esperanta poezio sed ve, la muziko — precipe Esperanta muziko — tute mankas (ĝis nun ne aperis unu sola programa simfonio kun Esperanta temo !). La kantoj havis ŝancon pli bonan, sed ne tre. Ni rigardu la nombron de eldonitaj kantaĵoj ! Estas nepre bezone rekonsciiĝi pri la socia funkcio de la muziko en nia Esperanta medio ! Teruran frazon mi aŭdis rilate tion : “Sed ni estas lingvista klubo . . . !”

Konsterna fakto estas, ke jam delonge ne aperas novaj *originalaj* kantoj Esperantaj. La publiko postulas muzikon kaj ni scias, ke eĉ la plej potencaj eklezioj devis siatempe cedi kaj akcepti la muzikon kaj kantadon en sian medion. Krome : ĉiu societo tre bezonas naturan instigan elementon kaj same oni sentas bezonon de ia kuntena forto. Ĝuste tiujn prezentas (1) muzika ritmo kaj (2) muzika harmonio.

Ĉiuj kulturaj movadoj sciis eluzi la potencon de la muziko. Fine oni ne nur bonvole akceptis sed furioze postulis specialajn verkojn kaj per ĉiuj atingeblaj rimedoj devigis la komponistojn krei apartajn komponaĵojn kun etoso reganta la movadon. Ni memoru nur la sen-nombrajn konkursojn de la plej diversaj organizoj kaj societoj (eĉ urboj konkurencas pri specialaj komponaĵoj kaj kantoj montrantaj ilian belecon kaj ĉion eblan . . . !). Kaj nia Esperanto movado . . . ? Mi ne volas kredi, ke oni kontentiĝas je la himno kaj poste nur je traduko de iu moda kantaĉo, ĝojsaltante, ke oni povas traduki en Esperanton eĉ— “Kiu timus de la lup’ . . . !”

Oni vere preskaŭ timus—sed neniel de la lup’—sed sole pri ia nova speco de snobismo Esperanta. Kiu propre akceptu la Esperantan kulturon, se ne la Esperantistoj mem ? Krome oni forgesas, ke pere de la muziko oni povas penetri tre facile en la medion neesperantistan (ekzemple radion, koncertojn, muzikfestojn, muziklernejojn k.t.p.). Jen ekzemplo :

Fino sur paĝo 45

R. Edis Fairbairn :

Glacirikolto

MUSKOKA, lagdistrikto de provinco Ontario en Kanado, ne estas bona loko por terkultivado. Ĝi havas tro da rokoj kaj akvo. La ĉefa "rikolto" venas de la turistoj. Tamen estas unu speciala rikolto, ne en aŭtuno, sed dum la vintro. Tio estas la rikolto de glacio !

Tial ke la ĉefa roko en la regiono estas granito, kaj preskaŭ ne troviĝas kalkŝtono, la lagakvo estas tre "mola", t.e. ne enhavas da solvita kalko. Do oni uzas ĝin ne nur por la lavado, sed ankaŭ por la trinkado. Vilaĝoj kaj hoteloj lagbordaj elprenas provizon da akvo per metaltubo, kies fora fino kuŝas profunde kaj je kelka distanco en la lago. Per pumpilo oni tiras ĝin en akvujon sur turo, el kiu ĝi fluas al la kranoj en domoj kaj ĉambroj.

Somerdomoj havas propran aerpremadan sistemon funkciantan per elektraĵoj motoroj, kiuj aŭtomate tiras akvon de la lago kaj fluigas ĝin sub premo.

Nuntempe oni diras, ke preskaŭ ĉiuj somerdomoj havas propran malvarmigilon elektran, kaj tio forigas la bezonon por glaciprovizejo, kiu antaŭe estis kromkonstruaĵo ĉe ĉiu somerdomo.

Kontraŭe al mia propra atendo, kaj, mi supozas, al la ideo pri Kanado en la pensoj de la plimulto de nekanadanoj, la karakteriza klimata ĝeno ne estas la vintra malvarmego, sed la somera varmo. Do, por konservi viandon, provizi malvarmajn trinkaĵojn kaj aparte por fari tiun amatan kanadan frandaĵon "ice cream" (kremglaciaĵo), ĉiuj somerdomoj havis propran glacidomon kun

dikaj duoblaj muroj plenigitaj per lignopolvo per kiuj izoli la glacion kaj konservi ĝin de Januaro ĝis Julio aŭ Septembro. Tio estis tute tiom necesa, kiom provizo da tranĉitaj lignopecoj por la bruligado.

Plenigis la glacidomojn kaj kolektis lignopecojn la vilaĝanoj dum la vintro laŭ aranĝo kun la somervizitantoj. Tio estas, aŭ estis, kutima enspeza eblo.

Veterkondiĉoj povas helpi aŭ malhelpi la glacirikolton same kiel la terkultivadon. Kun forta kaj daŭra frosto dum unu aŭ du semajnoj la glacio baldaŭ atingas dikecon de dek ĝis dudek coloj (25–50 cm.) Se tamen falas multe da neĝo sur maldikan glacion tio faras kvazaŭ lankovrilon, kiu malhelpas pluan glaciigon, kaj povas esti, ke dum vintro neniam kreiĝas sufiĉa diko por indigi rikolton. Krome estus danĝere paŝi sur la neĝkovrita glacio. Intermikso de neĝo kaj frosto faras la glacion ne klare travidebla, sed kaĉosimila. Tia glacio ne bone konserviĝas en glacidomo kaj ĝi ne longe valoras.

Tuj kiam oni anoncas, ke la glacio estas sufiĉe dika oni preparas la ilojn kaj aranĝas arojn da viroj. La estro signas sur la surfacon per stangoj areon ne tro malproksiman de la bordo sed sufiĉe foran por akiri puran glacion. Tio avertas al infanoj kaj al vagonoj, ke la glacio tie estas danĝera. Per hakilo oni truigas la glacion kaj per speciala glaciseĝilo mana aŭ motora oni tranĉas la glacion laŭ linioj. Poste oni tranĉas transverse kaj faras blokojn. Per grandaj glacipreniloj oni levas la blokojn el

Fino sur paĝo 45

Belartaj Konkursoj 1952 : Teatraĵo Originala

Taso da Teo

de F-ino E. de Burgh Daly

Ĉina fantaziaĵo

La agado okazas en Pekino en la jaro 1652

Personaro. *KU-MAJ, Riĉa komercisto*
ĈU-SAN, Lia edzino
O-DO-MAH, La maljunulo kun sanigaj manoj

Scenejo : La domo de KU-MAJ. Ekrano en la fono, meze. Antaŭ ĝi estas du taburetoj. Dekstre estas fajrujo kaj tablo. Sur la tablo : tasoj, boligilo, teujo, teskatolo k.t.p. Sur la planko : tapiŝoj, kusenoj dekstre kaj maldekstre, krizantemoj en florvazo.

(Eniras samtempe KU-MAJ dekstre kaj ĈU-SAN maldekstre. Ambaŭ portas nigran okulŝirmilon ; tio de ĈU-SAN kovras ŝian dekstran okulon, tio de KU-MAJ kaŝas lian maldekstran okulon. ĈU-SAN portas en sia maldekstra mano ujon plena de akvo. Ili kolizias meze de la scenejo.)

KU-MAJ (kliniĝas). Pardonu, via Moŝto ! Pro mia afliktaĵo vi pardonu min ! (Li rektiĝas kaj vidas ke estas ĈU-SAN). Kiu ? Estas vi, mallertulino ?

ĈU-SAN (frotas sian ŝultron). Jes, estiminda edzo. Estas mi ; Ĉu-San, via edzino.

KU-MAJ. Vi preskaŭ faligis min, malzorgulino. Pro mia blinda okulo mi ofte kolizias sur la strato kun preterirantoj, tiel ke pacigaj vortoj venas aŭtomate sur miajn lipojn. En mia propra domo estas ne-tolereble ke mia edzino mem fuŝiru kontraŭ min.

ĈU-SAN. Mi petas vian pardonon, Ku-Maj. Ne intence mi koliziis kun vi. Mia ŝultro eĉ doloras. Mi ankaŭ havas blindan okulon.

KU-MAJ. Jen vi plendaĉas kaj kompatas vin mem ! Nur por senkulpigi vin pro via mallerteco. Ĉu unu okulo ne sufiĉas por iu ajn virino ? (ĈU-SAN kliniĝas). Respondu ! Ĉu vi estimas vin supera al via edzo kaj pretendas je du okuloj kiam li havas nur unu ?

ĈU-SAN. Ne, kara edzo. Ku-Maj estas tiel supera al Ĉu-San kiel la suno al la tero. Tamen, iufoje mi pensas ke, kiam la Ĉefkuracisto de la Imperiestro . . .

KU-MAJ. Silentu ! Mi ne volas aŭdi pri la Ĉefkuracisto de la Imperiestro ! (ĈU-SAN kliniĝas). Kiam la fulmo blindigis mian okulon, ĉu la Ĉefkuracisto de la Imperiestro sanigis ĝin ?

ĈU-SAN. Ne. Li rifuzis sanigi ĝin antaŭ ol vi donos al li oron.

KU-MAJ. Se mi posedus la tutaĵon de la oro en Azio mi ne donus eĉ orpecon al la Ĉefkuracisto de la Imperiestro ! Kiu havigas al li palacon, servistojn, silkan vestaĵon ? Ne la Imperiestro, sed

ni, *ni*, la komercistoj de Pekino !
Per la impostoj kiujn ni pagas ni
plenigas la trezorejon el kiu la
Ĉefkuracisto de la Imperiestro
elsuĉas sian riĉaĵon ! Kaj li
ankoraŭ pretendas oron de mi !

ĈU-SAN. Tial honorinda edzo, ĉu ne
estus pli bone se vi estus ĵetinta la
tranĉilon kontraŭ la Ĉefkuraciston
anstataŭ kontraŭ min, via edzino ?

KU-MAJ. Sufiĉe. Mi ne plu
aŭskultos viajn plendaĉojn. Mi
volas dormi. Dume vi brogu por
mi teon.

ĈU-SAN. Tion mi faros, mia edzo.

KU-MAJ. Sed vi brogas malbone.

ĈU-SAN. Se mi brogas malbone mi
meritas vian kulpigon.

KU-MAJ. Atentu ke vi ne veku min.

(*Li kuŝiĝas sur kusenoj kaj
ekdormas. ĈU-SAN okupas sin pri la
fajro kaj pretigas teon. Frapo aŭdiĝas
ĉe la enirejo. ĈU-SAN malfermas.
Eniras O-DO-MAH, grizhara strang-
aspekta maljunulo.*)

O-DO-MAH. Bona mastrino, mi
petas refreŝigaĵon. Mi longe vojaĝis
kaj mi estas laca.

ĈU-SAN. Bonvenon al vi, estim-
inda fremdulo.

O-DO-MAH. Mi deziregas tason da
bona teo.

ĈU-SAN. Tion vi ricevos, honorinda
maljunulo, la plej bonan teon kiun
mi, Ĉu-San, scipovas brogi. Sed
mia edzo diras ke mi brogas
malbone.

O-DO-MAH. Espereble via edzo
eraras. Ĉu *li* estas via edzo ? (*Li
indikas KU-MAJn*).

ĈU-SAN. Li estas Ku-Maj, mia
honorinda edzo. Ne veku lin. Li
estas afliktita ; kiam li dormas
paco regas. Sidiĝu, honorinda
maljunulo.

(*O-DO-MAH sidiĝas apud la fajrejo,
dekstre. Li kantetas mallauĉe, kvazaŭ
al si mem. ĈU-SAN brogas la teon,
plenigas tason kaj volas proponi ĝin al
O-DO-MAH. Ŝi havas la dekstran
okulon kontraŭ li kaj du fojojn ŝi
misdirektas la proponitan tason.*)

O-DO-MAH (*incitite*). Ha ! Vi mokas
maljunulon, ĉu ?

ĈU-SAN. Pardonu min, mi petas.
Mi tute ne volas moki honorindan
gaston. Mi estas blinda je unu
okulo kaj tio igas min fuŝfari.

O-DO-MAH (*iom repacigite, sed
ankoraŭ malafable*). Se la teo estas
bona oni povas pardoni malĝentil-
aĵon. Mi demandis al multaj homoj
survoje, kaj ĉiuj diris ke neniu pli
ol Ĉu-San, la edzino de Ku-Maj,
indas fari teon por O-Do-Mah.

ĈU-SAN. O-Do-Mah ! La maljunulo
kun sanigaj manoj ?

O-DO-MAH. Sanigaj manoj kiam li
volas sanigi—kaj kiam oni traktas
lin respektplene. (*Li ektrinketas
teon, lia mieno ŝanĝiĝas ; li trinkas
denove ; li ridetas kaj kontenteco
esprimiĝas sur lia vizaĝo.*) Ĉu-San,
via edzo estas malsaĝulo. Li trinku
lakton dum sia tuta vivo. La teo
kiun mi ĵus trinkis estas la plej
bona teo en tuta Ĉinujo.

(*ĈU-SAN kliniĝas. O-DO-MAH
trinkas denove.*)

O-DO-MAH. Ah ! O-Do-Mah
reviviĝas ! O-Do-Mah sin sentas
denove forta. Diru al mi, honorinda
Ĉu-San, kiel okazas ke vi blindiĝis
je unu okulo ?

ĈU-SAN. Fulmo frapis mian edzon.

O-DO-MAH. Fulmo frapis vian
edzon kaj tio blindigis *vian* okulon ?

ĈU-SAN. Ne, O-Do-Mah, la fulmo
blindigis la okulon de mia edzo.

O-DO-MAH. Kial li ne sin turnis al la Ĉefkuracisto de la Imperiestro por ke li sanigu ĝin ?

ĈU-SAN. La Ĉefkuracisto de la Imperiestro rifuzis lian peton.

O-DO-MAH. Kial ?

ĈU-SAN. Ĉar mia edzo ne donis al li oron.

O-DO-MAH. Ĉu via edzo ne havas oron ?

ĈU-SAN. Mia edzo havas multe da oro.

O-DO-MAH. Do kial li ne donis oron al la Ĉefkuracisto ?

ĈU-SAN. Ĉar li koleriĝis kontraŭ li. Tial li ĵetis la tranĉilon.

O-DO-MAH (*ŝokite*). Li ĵetis tranĉilon kontraŭ la Ĉefkuracisto de la Imperiestro !

ĈU-SAN. Ne, O-Do-Mah. Li ĵetis la tranĉilon kontraŭ min, sian edzinon.

O-DO-MAH. Por ke vi ankaŭ blindiĝu, ĉu ?

ĈU-SAN. Li opinias ke tio estas pli justa.

O-DO-MAH. Kaj vi ? Ĉu vi opinias same ?

ĈU-SAN. Mia edzo ĉiam pravus. Tamen, se mi havus ankoraŭ miajn du okulojn mi ne estus tiel fuŝfara kaj mi pli kontentigus mian edzon.

O-DO-MAH. Ĉu vi ĉiam deziras kontentigi vian edzon ?

ĈU-SAN. Mi ĉiam deziras kontentigi mian edzon. Mi amas lin. Kaj li amas min. Iufoje li koleriĝas kontraŭ mi, sed tio estas nur por montri lian superecon.

O-DO-MAH (*leviĝas*). Ĉu-San, venu ĉi-tien.

(*Kvazaŭ hipnotigite ĈU-SAN alproksimiĝas al li.*)

O-DO-MAH. Forprenu la ŝirmilon de via okulo. (*ĈU-SAN obeas*). Kovru vian maldekstran okulon. (*ĈU-SAN obeas*). Kion vi vidas ?

ĈU-SAN. Mi vidas nenion. Ĉio estas nigra kiel en senluna nokto.

(*O-DO-MAH etendas siajn brakojn, faras manmovojn antaŭ la dekstra okulo de ĈU-SAN, kiu staras senmove, unu mano sur la maldekstra okulo.*)

O-DO-MAH.

De teo plej lerta brogant' en Pekino,
De l' edzo kolera amema edzino,
Afabla Ĉu-San ! De maljuna

fremdulo

Ricevu la vidon ĉe blinda okulo !

ĈU-SAN (*eligas krion de ĝojo*). Mi vidas ! Mi vidas klare ! Mi vidas vin per mia blinda okulo ! O-Do-Mah, vi sanigis min ! Mi dankas, mi dankegas vin !

O-DO-MAH. Ne dankinde. Vi revivigis min per taso da superbona teo. Nun mi foriras.

ĈU-SAN. Mi petas vin, ne foriru ĝis kiam mia edzo ankaŭ dankos vin.

O-DO-MAH. Mi ne deziras lian dankon. Post unu horo mi revenos. Tiam mi petos de vi ankoraŭ unu tason da teo. (*Li eliras*).

KU-MAJ (*vekiĝas*). Kio okazas ? Ŝajnis al mi ke mi aŭdis voĉojn.

ĈU-SAN. Ho mia adzo ! Okazis miraklo ! Mia blinda okulo estas sanigita ! Ĝi vidas !

KU-MAJ. Tio ne interesas min. Vi babilas pri blinda okulo por senkulpigi vin pro via mallerteco. Ĉu la teo estas preta ?

ĈU-SAN. Mi jam brogis teon por honorinda gasto—por O-Do-Mah kiu sanigis mian okulon !

KU-MAJ. O-Do-Mah ! La maljunulo kun sanigaj manoj ? (*Li leviĝas*). Kie li estas ?

ĈU-SAN. Li estas jam for.

KU-MAJ. Jam for ! Kial vi lasis lin foriri ? Kial vi ne vekis min ? (*kolerege*). Ne decas ke vi gastigu fremdulon dum via edzo dormas.

ĈU-SAN. Honorinda edzo, vi ordonis al mi ne veki vin. Mi petis O-Do-Mah'n ke li restu, sed li insiste foriris tuj post li sanigis mian okulon.

KU-MAJ. Vi ne estis blinda. Li ŝajnis sanigi vin por ĉesigi vian trompadon. Ĉiuj diras ke li estas malafabla maljunulo. Li nur sanigas kiam li estas kontenta.

ĈU-SAN. Li ja estis kontenta. Mi donis al li teon. Ĝi plaĉis al li. Li revenos post unu horo.

KU-MAJ. Li revenos, ĉu ? Tiam mi faros teon por li, kaj li sanigos mian okulon.

ĈU-SAN. Tion li certe faros, mia edzo. Sed ĉu ne estus pli oportune ke mi brogu la teon ? Li trovis ĝin bona.

KU-MAJ. Fanfaronu nur ! Mi faros mi mem la teon. Vi ĉerpos la akvon ĉe la fonto ; vi bruligos la fajron, vi miksos la teon, vi boligos la akvon, kaj kiam ĉio estos preta mi faros la teon mi mem. O-Do-Mah trinkos la teon kiun brogos mi, Ku-Maj.

ĈU-SAN. Estu kiel ŝajnas bone al vi, mia edzo. Tamen ne estas necese ke mi iru al la fonto. Mi ĵus ĉerpis freŝan akvon. Tie ĝi ankoraŭ estas.

KU-MAJ. Iru tuj.

ĈU-SAN. Mi iros. (*Ŝi prenas akvuĵon kaj eliras.*)

KU-MAJ (sola). Mi traktos afable la maljunulon, kvankam li estas mia malsuperulo. Mi servos lin per miaj propraj manoj. Tio flatos lin kaj li sanigos mian okulon. (*Frapo ĉe la enirejo.*)

KU-MAJ. Kia maloportuna vizitanto ! (*Li iras al la enirejo. Eniras O-DO-MAH.*)

KU-MAJ. Jen kiu vi, maljunulo ? Mi ne povas akcepti vin. Mi atendas honorindan gaston, kaj vi ĝenas min.

O-DO-MAH. Kiaspecan bonvenigon vi proponas al maljunulo ! Mi venas nur por peti tason da teo.

KU-MAJ. Mi ne povas doni al vi teon. Vi ne pretendu ke mi donu teon al ia ajn preteriranto !

O-DO-MAH. O-Do-Mah ne estas ia ajn preteriranto.

KU-MAJ. Vi ! O-Do-Mah ! (*Li kliniĝas.*) Pardonu, respektinda sinjoro. Mi ne sciis ke estas vi. Mi ja atendis vin, sed nur post unu horo. Sidiĝu, mi petas. Mia edzino iris al la fonto. Ŝi tuj revenos.

O-DO-MAH. Mi ne povas atendi ĝis ŝi revenos.

KU-MAJ. Do mi brogos teon por vi mi mem. Mi, Ku-Maj.

O-DO-MAH. Ĉu vi brogas bone kiel via edzino ?

KU-MAJ. La teo kiun brogas Ku-Maj similas la nektaron de la dioj.

O-DO-MAH. Mi atendos ĝis kiam mi ĵetos du fojojn duoble duojn kaj unu fojon duoble triojn. (*Li sidiĝas sur kuseno, prenas el poŝego tukon, lotkubojn kaj ĵetilon ; li etendas la tukon sur la planko kaj ĵetas kubojn dum li murmuretas la*

nombrojn. KU-MAJ blovas la fajron, plenigas la boligilon.)

O-DO-MAH. Duoble duoj ! (KU-MAJ freneze blovas). Duoble trio !

(KU-MAJ ĵetas teon en la teujon kaj verŝas akvon sur ĝin.)

O-DO-MAH. Duoble duoj ! (Li remetas la ludilojn en poŝegon. KU-MAJ skuas la teujon, kirligas la teaĵon per kulero, verŝas la miksaĵon en tason premrapide, kaj proponas ĝin al O-DO-MAH. Li staras, la blindan okulon kontraŭ la maljunulo, kun interplektitaj brakoj singratule. O-DO-MAH singarde trinkas guton da teo, faras grimacon kaj elverŝas la enhavon de la taso en florvazon.)

KU-MAJ. Vi diras nenion, O-Do-Mah. Ne ofte vi trinkas teon tian kian brogas Ku-Maj.

O-DO-MAH. Neniam antaŭe iu proponis tian teon al O-Do-Mah; ĝi meritas rekompencon.

KU-MAJ. Ne, ne. Estis libervola donaco. Mi ne deziras rekompencon tio estas eble vi sanigus ĉi-tiun blindan okulon. Estus bagatelaĵo por vi, nur simbolo de dankemo.

O-DO-MAH (*leviĝas*). Mi havigos al vi simbolon de mia dankemo. Ricevu vian merititan rekompencon. (Li ĵetas la tason kontraŭ KU-MAJ kiu eligas kriegon de doloro.)

(O-DO-MAH rikanas kaj eliras.)

KU-MAJ (*staras ŝancele*). Blinda ! (*ĉiam pli akre*) Blinda ! Blinda ! (ĈU-SAN eniras, portanta ujon da akvo.)

ĈU-SAN. Jen estas la akvo. (*Ŝi iras malantaŭ KU-MAJ al la tablo*). Helpu min, Ku-Maj. Ĝi estas peza.

Ku-Maj ! Kial vi ne respondas ? Ku-Maj ! Kio estas al vi ? Ho mia edzo kara !

KU-MAJ. Mi estas blinda.

ĈU-SAN. Kuraĝu, Ku-Maj, vi havas ankoraŭ unu okulon.

KU-MAJ. Mi havas du blindajn okulojn.

ĈU-SAN. Ho Ku-Maj, kion vi diras ?

KU-MAJ. O-Do-Mah blindigis min.

ĈU-SAN. O-Do-Mah ! Kiel ? Kiam ? Kio okazis ?

KU-MAJ. Li revenis. Li ne volis atendi. Mi brogis teon por li.

ĈU-SAN. Vi ! Vi brogis teon por O-Do-Mah ? Ho mia kompatinda edzo ! Kion li diris ?

KU-MAJ. Li diris ke tia teo meritas rekompencon.

ĈU-SAN. Kaj tiam ? Kion li faris ?

KU-MAJ. Li ĵetis la tason kontraŭ min. Kaj nun mi estas blinda. Neniam plu mi vidos la sunlumon, nek rigardos Ĉu-San, mian edzinon.

ĈU-SAN. Ho mia edzo, lasu al mi gvidi vin. (*Ŝi prenas lian manon kaj gvidas lin al la taburetoj kie ili sidiĝas. Ŝi penas konsoli lin.*)

(O-DO-MAH eniras ne vidata de ĈU-SAN.)

O-DO-MAH (*rigardas malestime KU-MAJn*). Malĝentila fripono ! Tiraneca edzo ! Homo kapabla proponi aĉan teon al mi, O-Do-Mah ! Li meritas sian punon ! Tamen . . . lia edzino jam sufiĉe suferas pro li. Mi ne deziras plipezigi ŝian ŝarĝon. Pro la taso da teo de Ĉu-San mi redonos la vidon al Ku-Maj. (*Li alproksimiĝas al la geedzoj. Li staras malantaŭ ĈU-SAN kaj frontas kontraŭ KU-MAJ. Li levas la manojn kun la*

LA ALASKA STAFETO kaj **KAPTITOJ DE LA GLACIROKOJ**

Originale verkitaj de F. Omelka

La supraj verkoj aperis unue kiel felietonoj en "Esperanto" 1949 kaj 1951.

Ili nun aperas en libroformo, kun aldonitaj fotoj, skizo pri la aŭtoro kaj plano de Alasko.

Formato 22 × 14.5 cm. 96 paĝoj

Tole bindita kun bilda polvŝirmilo

Prezo 6 ŝilingoj, afranko 4p.

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.

Mendu ĉe vialanda libroservo aŭ ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

KRONIKO JAPANA

el Ĉin- kaj Japanlingva originalo tradukis Kyūiti Nohara

Kvin volumoj papere binditaj, presitaj sur tre bona papero

Entute 818 paĝoj 22 × 15 cm.

"Vere grava aldono al nia literaturo"

Prezo 25 ŝil. - - - - - Afranko 1ŝ. 6p.

Eldonita de Japana Esperanto-Instituto

Mendu ĉe

Universala Esperanto-Asocio,

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

FISKA SIMFONIO

aŭ Tro da Oro en la Or-kest(r)o

Sendube tra la tuta mondo oni ŝercas pri ŝtatoficistoj, kaj foje aldonas merititajn malbenojn.

Tamen en Britujo tiu kritiko rezultas pli el tradicio ol el konvinko, kaj fakte al fremduloj la Britoj fanfaronas pri sia "nekoruptebla ŝtatoficistaro".

Tio ne malhelpas al la Fisko plej zorge kontroli la funkciadon de la diversaj departementoj, kaj efektive ekzistas fako de la Fisko nomata "O. kaj M." (Organizo kaj Metodoj) kies tasko estas doni konsilon al la stabestroj de la Departementoj. De tempo al tempo O. kaj M. sendas "teamon" de spertuloj al iu Departemento, kaj ili kribras, analizas, dispecigas, komparas, ĉirkaŭrigardas kaj ĉiel plej detale ekzamenas la organizon kaj metodojn.

Tiuj vizitoj ne ĝojigas la korojn de la ekzamenotoj, kaj jen kontraŭbato en formo de *imagita* ekstrakto de mok-raporto farita de O. kaj M. post vizito al la Reĝa Festa Koncertejo en Londono. Ĝi aperis en la staba bulteno de la socia-klubo de Transport-Ministerio.

* * *

"Dum konsiderindaj periodoj la kvar hoboĵistoj restis neaktivaj. Redukto de la nombro estas konsilinda; ankaŭ la egaligo de la laboro tra la tuta koncerto. Tiamaniere rezultus elimino de troakcentitaj laborfazoj.

La dek du unuaj-violonistoj senvarie ludis identajn notojn. Jen ŝajne nenecesa multobligado. La stabo de ĉi tiu sekcio devus esti draste reduktita; se estas bezonata granda

sonvolumo, tio estus havebla per uzo de elektrona amplifikatoro.

Elspeziĝis multe da energio en la ludado de mallongaj notoj, ekz. tridek-duonoj—verŝajne troa rafinado. Ni rekomendas la konformigon de la sonlongeco de ĉiu noto al la plej apuda dek-sesono. En tiu okazo estus eble utiligi pli grandskale la servojn de lernantoj kaj de ludistoj de pli malaltaj gradoj.

Evidentiĝis tro da ripetado rilate al iuj muzik-frazoj. Partituroj devus esti submetitaj al detala analizo kun celo efektivigi ekonomiojn. Nenian utilon provizas ripetado, pere de la kornoj, de frazo jam ludita de la kord-instrumentoj. Laŭ zorge farita takso, per elimino de ĉiu superflua frazo oni povus malpliigi la prezento-tempon de du horoj ĝis dudek minutoj; kaj intervalo ne plu estus bezonata.


La kondukisto konsentas ĝenerale pri ĉi tiuj rekomendoj, sed esprimas opinion, ke povus rezulti malpliigo de enirpagoj. En tiu, cetere nekredebla, okazo oni povus malpermesi uzon de difinitaj sekcioj de la aŭskulteja seĝaro, kun konsekvenca ŝparo de kromaj elspezoj (lumigado, deĵorantoj, ktp.).

En plej malfavoraj cirkonstancoj la tuta aranĝo povus esti nuligata, kaj la publiko povus iri al alia koncertejo, ekz. Albert Hall.

(Subskribita) "A. B. Surda."

Ĉu simila O. kaj M. ekzistas en aliaj landoj? W. A. Gething.

Se traduko aperus en nacilingva gazeto bonvolu sendi ekz. al S-ro Gething, ĉe UEA, Rickmansworth.



Enigma Konkurso N-ro 74

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 28 rue Stuyvenbergh, Brussel II, Belgujo. Por ĉiu tute korekta solvo oni kutime donas 5 poentojn. Ĉiufoje la tri personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion. Ĉiu MA de UEA kun la sama ŝanco povas komenci la sendon de la solvoj je kiu ajn momento. Limtempo por Eŭropo estas du monatoj.

Pliaj informoj, se dezirataj, riceveblaj de S-ro Mooy kontraŭ unu respondkuponon internacia.

Solvoj.

N-ro 160 : citronodoro, acidigita, ostraro, stacidomo, litioatomo, idiomio, tradicio, nostalgio, gladiatoraro, delegito, odoradi, radiostacio, eldonota, larmonta, aldononta, malgladigita.

N-ro 162 : variko, bireto, piloto, revadi, peradi, kapeto, korallo, pirato, rapidi, rapiro, karoto, teruro, palato, moralo, romano, nubeto, lapono, nomado, danubo.

N-ro 163 : Kun kiu vi festas, tia vi estas. Kongresdokumentoj, Ulan-uniformo, nordokcidento, kilometrofosto, infanteriano, ursoĉasisto, vic-paroĥestro, interkonsenti, fajroprenilo, ekspresvagonaro, stampilgravuristo, tradukekzerco, alarmsonorilo, stenografiisto, telegramportisto, infanveturilo, antaŭmangaĵo, vartistino, interpretisto, entomologiisto, sukerrafinejo, turgardisto, avenfaruno, spicobutiko.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 70-a konkurso: S-ro A. v. d. Velde (Belg) 157, S-ro E. Hansen (Dan) 148, S-ro M. Cornet (Ned) 137 p.

Enigma N-ro 167. Oni demandas radikojn. Ekzemplo: En la unua panjo faras la tuton, kiu estas speco de la dua. (Solvo: patkuk.)

Klopodu tiel retrovi la radikojn per la jenaj indikoj:

1. La unuan oni manĝas, la dua donas al ni mangaĵon, la tuto povas nin manĝi.
2. La unua estas metalo, la dua estas numeralo, la tuto troviĝas sur ŝipo.

3. La unuan oni aŭskultas, la duan oni povas aŭdi, kun la tuto oni promenas.

4. La unua estas sala, la duan virinoj portas, la tuto estas altranga militisto.

5. La unua konsistas el gutoj, la dua estas amaso da nenombreblaj gutoj, la tuto vivas en la dua kaj havas du grandajn dentojn.

Enigma N-ro 168 : Faru serion de 20 sesliteraj vortoj, el kiuj ĉiu du da sinsekvaj vortoj havas kvar komunajn literojn. La unua vorto egalas la lastan. La signifoj de la vortoj estas: 1. rusa mezuro de longeco; 2. grenspeco; 3. sur ĝi oni sidas bone; 4. birdo el ordo de paseroj; 5. metala miksaĵo; 6. molusko; 7. defendilo; 8. multedro; 9. birdeto; 10. nutraĵo por grundo; 11. ŝirma armaĵo; 12. malliberigi; 13. ĉeso de laboro; 14. ame tuŝeti; 15. insektomanga besteto; 16. konifero; 17. provizora loĝejo; 18. artefarita fajraĵo; 19. refreŝigejo; 20. kiel 1.

Enigma N-ro 169 : El la literoj de la vorto "KAMENPURIGISTO" faru kiel eble plej multe da oficialaj, nederivitaj verboj. Por ĉiu trio da vortoj unu poenton. Ĉiuj vortoj do finiĝu per "i". Nur la litero "i" povas dufoje esti en unu vorto. Vortoj kiel "agnoski" (neoficiala) aŭ "ŝtarigi" (derivita) ne taŭgas. La vortoj estu sepliteraj aŭ pli grandaj.

Poezio-Muziko : *fino.*

Venis konata lingvisto kontraŭ-esperanta al eminenta samideano. Tiu dum kelkaj horoj penis konvinki lin pri la valoro de la Internacia Lingvo sed malgraŭ ĉia elokventeco ne tre sukcesis. Fine tamen la lingvisto pretis cedi, sed kondiĉe, ke oni demonstru al li, ke oni "en Esperanto povas ankaŭ kanti . . . " Nu, amatora disko savis la situacion sed mankis nur hardistanco por fiaski. Bonvolu primediti. Venontfoje venos eble muzikisto kaj demandos pri muzikaĵoj ! Mi ne esperas ke iu kontentiĝus pri unu amatoreca disko kaj kelkaj paĝoj de kantlibreto !

Ĝi estas afero pli grava ol oni pensus. La muziko etendas sian helpan manon al la disvastigo de la Internacia Lingvo, estante ĝis nun la plej internacia, ja mem la sola universala interkomprenilo. Ni kaptu la okazon !

Glacirikolto : *fino.*

la akvo kaj ŝarĝas vagonon kiu portas la ŝarĝon al la glacidomo. Tie oni enpakas la blokojn kune por ke ili kunfandiĝu en unu amason, ĉirkaŭigas ilin kaj kovras ilin per ligna polvo.

Se brilas la suno kaj frostas, sed ne ventas, tio povas esti ĝuebla komuna laboro. Tamen se degelas aŭ ventas forte, ĝi povas esti ĝena. Ĝi kompreneble estas peza laboro. Se la vilaĝanoj povas trovi alian taŭgan laboron ili ne multe domaĝos al la someruloj ties provizon de elektraĵoj malvarmigiloj.

Taso da Teo : *fino.*

manplatoj malsupre, prepare al fari sorĉigajn manmovojn.)

ĈU-SAN. Mia edzo, ni ankoraŭ havas du okulojn, vi kaj mi. Miaj okuloj estas viaj okuloj. Tra miaj okuloj mi igos vin vidi la florojn, la arbojn kaj la etajn birdojn. Mi gvidos kaj flegos vin dum mia tuta vivo.

KU-MAJ. Ho Ĉu-San, mia amata edzino ! Vi estas la lumo de miaj blindaj okuloj ! (*Li ripozigas la kapon sur ŝian bruston.*)

O-DO-MAH (*ridetas, mallevas la manojn, balancigas la kapon*). Pli bone estas tiel. Blinda li restu. (*O-DO-MAH eliras.*)

Kurteno.


PAPILIOJN

mi deziras interŝanĝi kun kolektantoj el ĉiuj landoj.

Skribu aŭ sendu dudekon el via lando, kaj vi ricevos la saman kvanton el Mezameriko.

Adreso :

LEONIDE KATCHUROVSKY,
Poste Restante—
Guatemala Cd.,
Gvatemalo, C. Ameriko.



Radio kaj Esperanto

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Por somera tempo oni aldonu laŭ neceso—kutime 1 horon.
Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso, M=Muziko

Lundo	22.15–22.40	Hilversum, 402m. kaj 188m. I.M. (ĉiun duan lundon) : V.A.R.A. Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Mardo	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 13.94m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	15.00–15.15	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan mardon).
	17.35–17.40	Bern. 48.66m., 31.46m., 19.60m. P. D-ro Baur.
Merkredo	15.45–16.00	Graz. 417.2m. K. (ĉiun duan merkredon) Radio Graz, Aŭstrujo.
	18.00–18.20	Roma. 25.21m., 31.35m., 49.92m. P. Radio Roma—Esperanto, Via Vitorio Veneto 56.
	19.30–20.00	Madrid. 225m., 42.33m. P. Radio S.E.U., Sección Esperanto, Diego de León 49, Madrid, Hispanujo.
	21.35–21.40	Wien. 513m., 25.46m., 48.74m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
Ĵaŭdo	07.35–07.40	Lille. 218m. I. Prof. Labit, 1 rue St-Martin, Lille (Nord), Francujo.
	08.30–08.45	Paris. 348m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
Vendredo	18.00–18.20	Roma. Kiel merkrede.
	22.15–22.30	Hilversum. 298m. P. N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro, (DF) Brazilo.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Svislando parolas al Suda Ameriko. La 31-an de Januaro la Svisa Radio disaŭdigas Esperantan programon per direktitaj antenoj al Suda Ameriko. Ĉi tiu elsendo estos ankaŭ bone aŭdebla en aliaj landoj, precipe en la sudokcidenta parto de Eŭropo kaj la nordokcidenta parto de Afriko.

La disaŭdigo okazos je 21.00 (Greenwich-a tempo) sur ondoj 31.04 kaj 49.55m.; ĝi estos ripetata la saman tagon je 23.15 sur ondoj 25.28, 25.61, 31.04, 31.46 kaj 41.61m. Ne forgesu aŭskulti ĉi tiun specialan elsendon, raporti al la stacio, kaj peti la belan, ilustritan programkajeron por la vintra sezono de la Svisa Radio-Societo, SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern, Svislando.

Nederlanda Radio. La ĉi-supre menciita programo de Hilversum N.C.R.V. okazas nur la unuan kaj duan vendredon de ĉiu monato. Ni publikigos la precizajn datojn kiam ni estos informitaj.

KARTA ENCIKLOPEDIO

Kulturhistoriaj kuriozaĵoj

16 kartoĵoj kostas 2 ŝil. (6 rpk.)

Mendu ĉe U.E.A.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 245

1-an de Decembro 1952

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la 30a de Novembro, kaj ankaŭ, por komparo, je la sama dato en 1951 :

	1951	1952
Asociaj membroj	8363	9398
Individuaj membroj		
MJ	897	930
MA	4558	3804
MS	285	524
Patronoj ..	16	10
DM	253	265
HM	59	58
	6068	5591
	14431	14989

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Tison, S-ro E., Sarcelles, Francujo
Fournier, S-ro G., Paris, Francujo

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1952

- 521. Almada, S-ro F. de S., Belo Horizonte, Brazilo
- 522. Sá Fortes, S-ro M. D., Perdoes, Brazilo
- 523. Magalhães, S-ro P. R., São Paulo, Brazilo
- 524. Xavier, S-ro F., Itajubá, Brazilo

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1953

- 60. Fuller, S-ro S. T., Brighton, Anglujo
- 61. Boscarino, S-ro G. S., Ragusa, Italujo
- 62. Strasser, S-ro H., Zürich, Svislando
- 63. Engen, S-ro P., Vestfossen, Norvegujo
- 64. Nesje, S-ro H., Aalesund, Norvegujo
- 65. Ringstad, S-ro G., Fredrikstad, Norvegujo
- 66. Rosback, S-ro H. A., Hasvik, Norvegujo
- 67. Baaten, S-ro W., Utrecht, Nederlando
- 68. van Delden, S-ro P., Deventer, Nederlando
- 69. van Dijk, S-ro J. P., Oosterland, Nederlando
- 70. Mabesoone, S-ro P. M., Amsterdam, Nederlando
- 71. Noordhoff, F-ino D., Laren, Nederlando
- 72. Roelofs, S-ro J. J., Soest, Nederlando
- 73. Zorgdrager, F-ino C., Amerongen, Nederlando

- 74. Zarraonandia, S-ro A. P., Bilbao, Hispanujo
- 75. Dunbar, S-ro R., London, Anglujo
- 76. Jones, S-ro D. R. T., Lampeter, Kimrujo
- 77. Langman, S-ro D. J., Birmingham, Anglujo
- 78. Riding, F-ino E., Herne Bay, Anglujo
- 79. Robertson, F-ino E. M., Halifax, Anglujo
- 80. Spence, S-ino F., E. Mersea, Anglujo
- 81. Spence, D-ro D. B., E. Mersea, Anglujo
- 82. Roth, F-ino F., Solothurn, Svislando
- 83. Blöndal, S-ro B. P., Hvammstanga, Islando
- 84. Smilga, S-ro K., Toronto, Kanado
- 85. Zeballos, D-ro R., Fray Marcos, Urugvajo
- 86. Carlson, S-ro F., Seattle, Wash., Usono
- 87. Williams, S-ro P., Timaru, Nov-Zelando
- 88. Hansen, S-ro A. E. R., Middelfart, Danujo
- 89. Nielsen, S-ro B., Kolding, Danujo
- 90. Petersen, F-ino A., København, Danujo
- 91. Fygle, S-ro B., Bodø, Norvegujo
- 92. Maarli, S-ro E., Bodø, Norvegujo
- 93. Broise, S-ro, Longué, Francujo
- 94. Georget, S-ro, Sens, Francujo
- 95. Luez, S-ro Daniel, Laon, Francujo
- 96. Poupert, S-ro R., Aubry-lez-Douai, Francujo
- 97. Svensson, S-ro S., Norrahammar, Svedujo
- 98. Jacobsson, S-ro J., Kilforsen, Svedujo
- 99. Larsson, S-ro C., Sala, Svedujo
- 100. Ekman, S-ro A., Norrahammar, Svedujo
- 101. Hohl, S-ro J., Flims, Svislando
- 102. Kuhn, S-ro G., Zürich, Svislando
- 103. Le Brun, S-ro P., Kreuzlingen, Svislando
- 104. Briggs, S-ro G. A., McKeesport, Pa., Usono
- 105. Vasiljef, S-ro L., København, Danujo
- 106. Alberich Jofré, S-ro S., Barcelona, Hispanujo
- 107. Maurel, S-ro S., Barcelona, Hispanujo
- 108. Peral, S-ro A., Elche, Hispanujo
- 109. Asp, S-ro B., Johanneshov, Svedujo
- 110. Holmström, S-ro A., Silverhøjden, Svedujo

111. Mellberg, F-ino G., Varberg, Svedujo
112. Soares, S-ro J. M. A., Luanda, Angolo
113. Lopes do Rego, S-ro M., Lisboa, Portugalujo
114. Serra, D-ro P., Aveiro, Portugalujo
115. Antunes, S-ro J., Lisboa, Portugalujo
116. Lamberts, S-ro V., Bruxelles, Belgujo
117. Geerinck, S-ro R., St. Niklaas, Belgujo
118. Couvreur, S-ino M., Bruxelles, Belgujo
119. La Pila, S-ro L., Milano, Italujo
120. Aarsaether, S-ro E., Oslo, Norvegujo
121. Bugge-Paùlsen, Kapt. R., Oslo, Norvegujo
122. Stjernesund, S-ro E., Lilleström, Norvegujo
123. Bluett, S-ro T. L. C., London, Anglujo
124. Clarke, S-ro W., Dunfermline, Skotlando
125. Daly, F-ino E. de B., Okehampton, Anglujo
126. Hilder, S-ro E. C., Bideford, Anglujo
127. Ingham, S-ro H., Liverpool, Anglujo
128. Kennedy, S-ro D., Bishop Auckland, Anglujo
129. Kennedy, S-ino M., Bishop Auckland, Anglujo
130. Murray, S-ro R., Thorpe Bay, Anglujo
131. Saunders, S-ino A. J., Ventnor, Anglujo
132. Tegg, F-ino E. W., Ruislip, Anglujo
133. Nii, S-ino A., Toronto, Kanado
134. Turner, S-ro G. P., Middleton, Wis., Usono
135. Crowley, D-ro R., Welwyn, Anglujo
136. Pearson, S-ro M., Sheffield, Anglujo
137. Zielinski, D-ro Z. M., London, Anglujo
138. Sproxton, S-ro R. A., Tollerton, Anglujo
139. Dauzenroth, S-ro R., Forest Grove, Ore., Usono
140. Tobusch, S-ro H., Chicago, Ill., Usono
141. Frode, S-ro O., Göteborg, Svedujo
142. Johansson, S-ro V. A., Göteborg, Svedujo
143. Andersson, S-ro A., Ålingsas, Svedujo
144. Amelin, S-ino H., London, Anglujo
145. Dodge, S-ro E. G., Washington, D.C., Usono
146. Brenner, D-ro C., Erlenback, Svislando
147. Steinemann, F-ino E., Bern, Svislando
148. Bastien, Int.-Gen., L., Paris, Francujo
149. Bernard, S-ro R., Bois-Colombes, Francujo
150. Guillaume, S-ro J., Le Vesinet, Francujo
151. Trésorier, S-ino J., Liesle, Francujo
152. Vautrin, S-ro J., Paris, Francujo
153. Waringhien, Prof. G., Choisy-le-Roy, Francujo
154. Rokkan, S-ro G., Narvik, Norvegujo

DONACIOJ. V. R. Bocock 2ŝ. 6p., S. T. Fuller 35ŝ., C. S. Davis 4ŝ., F-ino H. Steele 5ŝ., K. Smilga 7ŝ., G. P. Turner 7ŝ.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

CECIL C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

U.E.A. havis grandajn elspezojn por la reprezentado kaj informado ĉe la Unesko-konferenco. Vi povas komplimenti la faritan laboron per donaco al la Propaganda Kaso de U.E.A.

Internacia Konkurso 1952

Stato je la 30a de novembro 1952

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Izraelo ..	350	495	141.4
2.	Brazilo ..	4500	5973	132.7
3.	Maroko ..	500	645	129.0
4.	Norvegujo ..	1700	2015	118.5
5.	Hispanujo ..	1300	1505	115.8
6.	Italujo ..	2200	2475	112.5
7.	Aŭstralio ..	850	935	110.0
8.	Nov-Zelando	800	880	110.0
9.	Kanado ..	250	270	108.0
10.	Islando ..	400	430	107.5
11.	Svedujo ..	5200	5440	104.6
12.	Svislando ..	1400	1450	103.6
13.	Urugvajo ..	250	255	102.0
14.	Germanujo ..	3200	3250	101.1
15.	Japanujo ..	900	905	100.6
16.	Sud-Afriko ..	300	290	96.7
17.	Belgujo ..	2300	2180	94.8
18.	Nederlando ..	4800	4547	94.7
19.	Francujo ..	5500	5130	93.3
20.	Danlando ..	2700	2485	92.0
21.	Usono ..	2500	2293	91.7
22.	Britujo ..	12000	10550	87.9
23.	Finnlando ..	2600	2125	81.7
24.	Aŭstrujo ..	1000	745	74.5
25.	Kubo ..	250	185	74.0
26.	Portugalujo ..	800	580	72.5
27.	Irlando ..	250	170	68.0

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Ne timu, ĉar Mi estas kun vi ; ne maltrankviliĝu, ĉar Mi estas via Dio ; Mi vin fortigos, Mi vin helpos, Mi vin subtenos per Mia justa dekstra mano. *Jesaja 41. 10.*

Internacia Kultura Semajno 3-10 Aŭgusto 1953 en Kultura Esperanto-Domo, Grésillon. Informas detale kontraŭ internacia respondkupono G. Odent, Lycée de LAON, Aisne, Francujo. Represo petata.

Kultura Esperanto-Domo akceptos laŭeble de Junio ĝis Septembrofino ĉiulandajn Esperantistojn. Eventuale iam ajn ankaŭ karavanojn. Informpeto sendota kun internacia respondkupono al Kultura Esperanto-Domo, Grésillon, BAUGE, M-et-L., Francujo. Represo petata.

BOURNEMOUTH, floriĉa reĝino de la Brita Riviero, bonvenigos vin ĉe la Brita Kongreso dum Pentekosto 1953. Informojn ĉe Hon. Sek., S-ino Laurie, 6 Marlborough Road, Bournemouth, Anglujo.

Por du respondkuponoj vi ricevos 50 malsamajn poŝtmarkojn francajn ; plie unu fotografiaĵon de Parizo. Robert Collet, 1 rue du Filoir, ETAMPES (Seine-et-Oise), Francujo. Nepre respondos.

Deziras korespondi en Esperanto kun viktimo de poliomyelitis (virino aŭ viro), prefere komencanto, F-ino Kathleen Sharpe, 105 Burgess Road, LEICESTER, Anglujo.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katloika kredo, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo. Sekretariejo: Fraterhuis, LOONOPZAND, Nederlando.

18-22 jaraĝaj gelernantoj en la katolika klubo de Canberra deziras korespondi kun geamikoj tutmondaj. Skribu al F-ino Maureen Brophy, 77 Empire Circuit, Forrest, CANBERRA, A.C.T., Aŭstralio.

Edward Sugar, 5 Stamford Street, Sale, MANCHESTER, Anglujo volas korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

Interstenanoj partoprenontaj stenografian konkurson en Zagreb bv. komuniku al C. Daglio, v. Campanella 51, TORTONA (Aless.), Italujo sian adreson kaj, Interstene, kelkajn informojn pri sia personeco. Ili ricevos baldaŭan respondon.

Tri finnaj popollernejaj instruistoj deziras korespondantojn por siaj gelernantoj 10-12 jaraj (sume 70). Sendu adresojn al Instr. H. Noponen, Hämeenp. 31.B.18, TAMPERE, Finnlando.

La Esperanto-klubo en Hoogezand-Sappemeer, Nederlando, organizos en Februaro 1953 letervesperon. Sendu multajn kartojn, leterojn aŭ presaĵojn al sinjoro M. Abbas, B.C.-Straat 60, SAPPEMEER, Nederlando.

Esperanto-poŝtmarko de Aŭstrujo sur unuataga koverto kontraŭ tri resp. kup. La sama kun 4-bloko, kvar resp. kup. I.A.P.K., Box 5085, GÖTEBORG 5, Svedujo.

Jarkotizo 1953 en neuzitaj poŝtmarkoj egalvalore 1 usona dolaro. Vi ricevos *Internacia Poŝtmarka Revuo* 8-foje kun senpaga interŝanĝanonco. I.A.P.K., Box 5085, GÖTEBORG 5, Svedujo.

Deziras interŝanĝi p.m. kaj bildkartojn kun gesinjoroj en Afriko, Azio kaj Sud-ameriko. Mi donas norvegajn kaj eŭropajn p.m. kontraŭ viaj. Johs. G. Hansen, R.H. vei 119, ODDA, Norvegujo.

Internacia Framasona Ligo. Ĉiuj Esperantistoj-Framasonoj estas invitataj aliĝi al la Esperanto-sekcio de I.F.L. Adreso, 8 rue du Persil, Bruxelles (Belgujo).

SVEDA SOMERA SEMAJNO

Internacia somera kurso en la idilia FROSTAVALLÉN, HÖÖR, Svedujo (en la suda provinco Skanio) 9-16 aŭg. 1953. Prelegtemo : "Internacia kultur-interŝanĝo". Ekskursoj k.t.p. Invititaj prelegistoj : Prof. Edm. Privat, Prof. Ivo Lapenna, D-ro Karl Söderberg, k.a. Aliĝu tuj sed plej malfrue la 1-an de marto 1953.

Informojn petu ĉe Jan Strönne, Amiralsgatan 36, MALMÖ, Svedujo.

Sveda Esperanto-Instituto.



MAJSTROVERKO DE LA MONDLITERATURO

IBSEN: PEER GYNT

El la norvega tradukis E. A. Haugen

Prezo : bind. 15 ŝil., broŝ. 12ŝ. 6p., afranko 9p.

Eldonis : ELDONA RONDO,
Boks 178, Trondheim, Norvegujo

Mendu ĉe via librovendisto aŭ ĉe
U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

BONVENA DONACO

je Kristnasko

je datreveno

kiel dankesprimo

MORTO DE TRAJNO

de Freeman Wills Crofts

tradukita de Mason Stuttard

"Antaŭ ol mi komencis legi, mi timis, ke mi ne havos sufiĉe da persisto por tralegi libron, kiu neniom interesas min. La supozo montriĝis erara. Mi ne sentis emon formeti la libron, nur emis daŭrigi ĝis la fino, kaj mi nenion transsaltis . . ."

Stellan Engholm en *Malgranda Revuo*.

Tole bindita, kun plurkolora polvŝirmilo—256 paĝoj 9 ŝil., afranko 6p.

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.

Mendu ĉe enlanda libroservo aŭ ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

